

1980 julio – aŭgusto

73-a jaro

n-ro 895-6 (7-8)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — 3015 bj rotterdam — nederlando



Televida filmo pri esperantistino

Vi trovos,

svarmon da temoj ĉi-numere, kutiman por tiu ĉi periodo de la jaro. Versajne ni jam pli frue iam plendis, ke almenaŭ du trionoj de ĉiuj atentindaj aranĝoj en la Movado okazas inter majo kaj septembro. Se oni — ho, jes, tiuj oni — aktivus tra la tuta jaro, kiel Luĉjo volis (vi ja memoras almenaŭ la vortojn "konstante frapante"), la vivo de la redaktoroj estus pli tolerebla. Tia distribu de la aktiveco havus ankaŭ aliajn avantaĝojn. Provu aranĝi ion en novembro aŭ marto, kaj vi vidos kian atenton ni dediĉos al vi en ĉi tiu revuo. Ĉar tamen ekzistas homoj, kiuj unue legas ĉi tiun rubriketon kaj atendas en ĝi ian redaktoran rekomendon, jen — havu ĝin: La plej fascina teksto en ĉi tiu numero estas la gramatika artikolo de Ŝimizu (sur la paĝoj 129–131). Kaj, ni vere ne faras ĉi tiun rekomendon pro la fakto, ke ni duonigis tiun kontribu-aĵon kaj volus elaĉeti niajn pekojn. Nu, tiom. Ĝis relego en septembro!

Enhavo

- 121 Universaleco de la Movado: La Movado estas universala, sed ni pensas kaj agas eŭrope (S. Milojević)
- 122 Informado: Kio okazas al "Newsweek"? ; Vojaĝoj al Brazilo
- 123 Junulara seminario en Strasburgo: Novaj vojoj por la movada junularo (Stefan MacGill); Komitato de UEA: Novaj komitatanoj B
- 125 Studvizito al Unuiĝintaj Nacioj: En oktobro al Nov-Jorko
- 126 Renkontiĝo "Bydgoszcz 80": Pli ol mil ducent partoprenantoj
La Delegita Reto: Utilo eksterduba, modernigo necesa (C. Støp-Bowitz)
- 127 Landa agado: Prelego kiel ĉefa evento
- 128 Pakistana viglo; La lingvo kaj la presistoj: Malbelo pro nescio (Wouter F. Pilger)
- 129 Lingvo: Laŭokazaj lingvaj notoj pri "Laŭokazaj lingvaj notoj" (Koiĉi Ŝimizu)
- 132 Recenzoj: "Enkonduko en la originalan literaturon de Esperanto" de W. Auld (S. Bakrin); "Kumeŭaŭa" de T. Sekelj (B. Kolker); "La nokto-meza kortumo" de B. Merriman (C.R.L. Power); "Songpoemo pri ponto kaj aliaj kantoj" — islanda gramofondisko — (W.F. Pilger); "Participoj kaj konjugaciaj formoj en Esperanto" de O. Reiersøl (P. Daŝgupto); "Enkonduko al ne-eŭklidaj geometrioj", "Enkonduko al finiaj geometrioj" kaj "Pluredroj kaj plurceloj" de W.F. Orr (J.O. de Kat); "Ĉu li bremsis sufiĉe?" de J. Valano (V.V. Samodaj)
- 135 Laste aperis. . . (novaj eldonaĵoj en aŭ pri la Internacia Lingvo)
Kalendaro: Kien iri poste? (movadaj renkontiĝoj de la mezo de aŭgusto ĝis la mezo de oktobro ĉi-jare)
- 136 TEJO-paĝo: La 37a Internacia Junulara Kongreso de TEJO: Kial iri al Meksikio?; El poŝtosako
- 137 Nekrologoj (E.W. Anjou, R. Balleux, J.S. Dinwoodie, V. Ĝorgieski, L. Györy Nagy, T. Isiguro, S. Kusurakis, Ŝ. Mijake, D. Nikolić, Z. Toki)
Loke — Fake — Persone (mallongaj novaĵoj)
- 139 Oficiala informilo el la Centra Oficejo de Universala Esperanto-Asocio
- 140 Ekzameno E (Bernard Golden)

La kovrilo

Komaki Kurihara, japana aktorino kiu ĉefrolis en la televida filmo pri la fama esperantistino Verda Majo (ŝia vera nomo estis Hasegawa Teru). "Hejmsopira stelo", tiel nomiĝas la filmo, estas komuna produkto de ĉinaj kaj japanaj filmistoj kaj geaktoroj. Ĝi estis elsendita preskaŭ samtempe en la ĉina kaj japana televido. En Japanio, kie la elsendo okazis la 26an de majo, la multmilionan spektantaron enkonduke alparolis s-ino Yukiko Isobe, direktorino de Japana Esperanto-Instituto. La filmo plurloke uzas ankaŭ la Internacian Lingvon. Ni esperas, ke ni poste povos pli detale raporti pri ĉi tiu grava evento.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefono: (010) 36 15 39.

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Fondita en 1905 de M. P. Berthelot (1881-1910). Legantoj en 91 landoj.

Redaktoro: Simo Milojević.

Abonprezo por unu kalendaro jaro: 33,00 gld. (kun membreco kaj Jarlibro 55,— gld). Unuopa ekz. 3,— gld.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1000, 1/2 p. 530, 1/4 p. 290, 1/8 p. 170, 1/16 p. 110. Instancoj kaj entreprenoj de la Esperanto-movado rajtas rabaton de 50%. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Ripetrabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Cool-singel 93, 3012 AE Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804).

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telegramadreso:

ESPERANTO ROTTERDAM.

Estraro de UEA

Prezidanto kaj estrarano pri kulturo kaj eksteraj rilatoj: d-ro Humphrey Tonkin, Stouffer College House, 3700 Spruce St., Philadelphia, PA 19104, Usono; tel. (215) 382-5874.

Vicprezidanto: mag. William Auld, 20 Harviestoun Road, Dollar, Clacks., Britio, FK14 7HG; telefono (02594) 2339.

Vicprezidanto kaj estrarano pri faka agado kaj la delegita reto: prof. d-ro Carl Støp-Bowitz, Camilla Colletts vei 3, Oslo 2, Norvegio; telefono (02) 44 80 85

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado kaj planado: d-ro Werner Bormann, Schärstr. 26, D-2050 Hamburg 80, FR Germanio; telefono (040) 7384508.

Estrarano pri landa kaj regiona agado: s-ino Ursula Grattapaglia, Caixa Postal 04-0097, BR-70000 Brasília, Brazilo.

Estrarano pri administrado, financoj kaj specialaj taskoj: s-ro Grégoire Maertens, Pr. Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; tel. (050) 35 49 35.

Estrarano pri edukado: s-ro Andrzej Pettyn, skr. poczt. 46, PL-05-822 Miłanówek, Pollando; tel. (22) 58 37 08.

Estrarano pri kongresoj kaj turismo: d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u. 5/b VII.22., H-7624 Pécs, Hungario; tel. (72) 23-274.

La Movado estas universala, sed ni pensas kaj agas eŭrope

”LA SUDA HEMISFERO efektive ekzistas”, mi bildkarte mesaĝis al pluraj eŭropanoj, fine de majo ĉijare. Sonu kiel ajn strange, sed tio estas ankaŭ la ĉefa movada novaĵo, kiun mi kunportis el Sud-Ameriko, kaj kiun mi nun volas ripete pritrumpeti. Jen la kialoj: En Rio-de-Ĵanejro oni rapide konstatas, ke tiu urbego estas eĉ pli bela, ol la ekzotikaj bildkartoj pri ĝi. Tamen, ravis min en Rio io alia. Vi ja supozas, ke mi iris tien pro movadaj, t.e. kongresaj, kialoj. Vi facile povas imagi, ke mi kunportis la tutan kvanton da antaŭjuĝoj eŭropaj pri la sud-amerika Movado. Mi celas tiun disvastiĝintan opinion, ke la Esperanto-movado ”floras” en Eŭropo, kaj la resto de la mondo estas nur evolukontinentoj.

En Rio mi vizitis la sidejojn de la du landaj asocioj de UEA tie, Brazila Esperanto-Ligo kaj Kultura Koooperativo de Esperantistoj. Diference de Eŭropo, kie la sidejoj de la landaj asocioj ofte troviĝas en la maldekstra poŝo de la prezidanto aŭ en plej bonaj okazoj en unu el la tirkestoj de la koncerna funkciulo, tiuj du brazilaj movadaj organizaĵoj havas verajn sidejojn kaj jam de jardekoj nestas tie. Ankaŭ la tria tutlanda organizaĵo movada tie — Brazila Konsilantaro de Esperanto — havas sian sidejon en la ĉefurbo Brazilio kaj eĉ plene proprietas tiun komfortan duĉambran oficejon. La kvara brazila Esperanto-organizaĵo, tiu en San-Paŭlo, same havas sidejon kaj, kvankam nur regiona organizaĵo, pro siaj graveco kaj agado tiu asocio akiras tutlandan signifon.

Laŭ tio, kion ni en Eŭropo scias pri la Movado en Brazilo, devus soni tute strange, ke mi sukcesis kunvenigi en Rio la prezidantojn de tiuj kvar brazilaj movadaj organizaĵoj. Tamen, ne estis malfacile tion atingi, malgraŭ la fakto, ke du el tiuj funkciuloj loĝas je plurhora vojaĝdistanco de Rio. Montriĝis necese konvinkadi la kvar prezidantojn, ke la venontjara Universala Kongreso en Brazilio estas afero, kiu koncernas ĉiujn kvar organizaĵojn kaj ĉiujn brazilajn esperantistojn. Ili bone konscias pri tio. Brazilaj movadaj organizaĵoj havas plurajn milojn da membroj. Eble do ne estas lukso havi tiel multajn asociojn tie. Celi ke la movadanoj el Fortaleza (en la nordo) kaj Porto Alegre (en la sudo) estu en la sama Esperanto-organizaĵo similas al atendoj, ke unuiĝu Norvega Esperantista Ligo kaj Helena Esperanto-Asocio. Tiom da flughoroj estas inter Fortaleza kaj Porto Alegre.

En Brazilo mi renkontis nur iom pli da homoj ol eblas enprogramigi dum unusemajna restado. Mi vidis tie librojn en Esperanto, kiuj neniam aperis sur la internacia libromerkato. Sed, mia ĉefa surprizo en Brazilo

estis la movadaj homoj. Mi ne pensas nepre kaj nur pri la funkciuloj. Ekzistas tie homoj, kies nomojn mi neniam antaŭe aŭdis, kiuj neniam suriris la internacian movadan scenejon, sed kiuj simple ŝokas per sia lingva altniveleco kaj per sia detala informiteco pri la internacia Esperanto-movado. Pluraj el ili senĝene povus siĝi en ĉiu Komitato aŭ Estraro de UEA.

Alteriĝinte en Bogoto (Kolombio) por malpli ol unu-hora flugpaŭzo, mi vagis tra la bazara homkaldrono tie. Mi pensis, ke en tiu lando dum la lastaj jaroj efektive bolas ia granda movada kaldrono, pri kies enhavo neniue en la internacia Esperanto-movado bone konscias. Iom similajn pensojn mi havis preterflugante Venezuelon. En Meksikio mi devis ekzameni la lokajn kondiĉojn, ĉefe la homajn, por tie en 1981 okazigi la Internacian Junularan Kongreson de TEJO (vidu la paĝon 136). Ne necesis multa pripensado por konstati, ke Esperanta Meksika Junularo ne estas pli ”kuraĝa”, ol la grupoj, kiuj antaŭ kelkaj jaroj organizis similajn kongresojn en Greklando, Danlando aŭ Francio. Ankaŭ tie mi vidis eldonaĵojn neniam antaŭe renkontitajn, vizitis modernan luatan sidejon, aŭdis pri 70-persona seminario en decembro 1979, okaze de la Internacia Jaro de la Infano ktp.

Reveninte al Eŭropo, mi trovis sur mia tablo la bultenon *Japanio aktivas*, en Esperanto. Fine, ĝi komencas malŝlosi tiun strangan pordon de japanlingvaj Esperanto-periodaĵoj, malantaŭ kiu enŝlosiĝas la japana Movado. Nun ni povos iom sekvi la tutan viklecon kaj vervon, per kiuj jam delonge distingiĝas Esperanto en Japanio. Nun ni eble sukcesos informiĝi pri la movadaj eldonaĵoj en tiu lando, antaŭ ol ili elĉerpiĝas. Apud Japanio bolas plia movada kaldrono — Korea Respubliko. Tie la lingvon lernas tutaj brigadoj da entuziasmoj, ĉefe junaj. De tie venadis ĝis nun ankaŭ tiu luksa revuo en la Internacia Lingvo kaj eĉ libroj eldoniĝis ne malofte.

Mi pensas ankaŭ pri Irano kaj la fakto, ke la amasa movado por Esperanto tie eĉ nun, en komplikaj sociaj kondiĉoj, ne komencis flagri sed daŭre flamas. Viglas la Movado ankaŭ en Pakistano (vidu p. 128). Io okazas en Sirio kaj Egiptio, moviĝas aferoj ankaŭ en Hinda Unio, en Ĉilio kaj Urugvajo. En Argentino nun okazas Tutamerika Esperanto-Kongreso, kaj en Kanado baldaŭ sekvas la Pacifika Kongreso de Esperanto. Ĉinio ĉiam pli kaj pli sekvas sian ĝeneralan malfermiĝon ankaŭ rilate la Movadon, kaj mi ne dubas, ke tie restas ankoraŭ multo movada por konsciiĝi pri ĝia ekzisto. Aŭstralio kaj Nov-Zelando ĉiam apartenis al la movade priplugita tereno. Eble nur Afriko estas ankaŭ el la

movada vidpunkto nia evolukontinento, des pli ke ni ankoraŭ ne sukcesis solvi la madagaskaran enigmon. Cetere, tiuj miaj bildkartoj, kun la mesaĝo pri la ekzisto de la suda hemisfero, ne atingis la adresitojn. Mi donis ilin, kun la mono por afranko, al suspektinda "poŝtisto" ie en Amazonio, dum flugpaŭzo. Tial mi decidiĝis denove laŭti pri la nealveninta mesaĝo.

Spertinte la brazilan Esperanto-movadon eĉ dum mallonga tempo, havante nun legeblan informilon pri Japanio kaj supozante, ke mia ofico ebligas al mi tute privilegian informitecon pri la internacia Esperanto-movado, mi komencas opinii, ke niaj vekrioj pri la troa eŭropeco de la Movado estas senbazaj. Ne estas tiel, ke la Movado mankas en la ceteraj mondpartoj, sed mankas esperantistoj el tiuj mondpartoj en la forumoj

de la internacia Esperanto-movado. Kiam ni kunmetas kaj elektas niajn komitatojn, estrarojn kaj komisionojn, ni simple forgesas la ne-eŭropanojn. Ili ne ĉeestas kaj ni ignoras ilian ekziston. Ni papage ripetas la malĝustaĵon, ke la Movado estas tro eŭropa, ĉar ni kalkulas nur pri tiuj kiujn ni renkontas kaj konas. Ni havas iujn financajn tabuojn, kiuj asertas, ke niaj buĝetoj ne eltenus ekstereŭropajn estraranojn, ekzemple. Ni faris etan provon rompi tiujn tabuojn en la lasta estrara mandato kaj UEA ne bankrotis pro tio. Male, tio venigis al la Asocio pli da membroj kaj pli da landaj asocioj en Sud-Ameriko. La Movado do estas enviinde tutgloba, sed ni daŭre pensas kaj agas eŭrope. Ankaŭ tio estas aspekto de diskriminacio pri kiu devus okupiĝi la Kongreso en Stokholmo.

S. Milojević

INFORMADO:

Kio okazas al „Newsweek”?

EN SIA RUBRIKO "Aktualaĵoj", en la numero de la 16a de junio ĉi-jare, la mondrenoma usona magazino *Newsweek* dediĉis kvaronpaĝan tekston al Esperanto. La titolo de tiu proksimume 220-vorta artikolo estas "Kio okazas al Esperanto". *Newsweek* servas tie al sia plurmilionla legantaro "aktualaĵojn" kaj "novaĵojn", kiuj aĝas preskaŭ plenan jarcenton. Oni povas legi tie, ke la lingvon "kunmetis pola kuracisto Ludoviko Zamenhof", ke ĝi estas simpla, 16-regula, sen esceptoj ktp. Enestas ankaŭ interesa frazo, kiu tekstas: "Kvankam Esperanto neniam populariĝis — malpli ol unu

miliono da homoj flue parolas ĝin — tamen ĝiaj apogantoj paroladas pri eksukceso." Alia frazo mencias niajn pretendojn, "ke la lingvo impresas alloge al triamondaj landoj, ĉar ĝi ne havas tiun ligitcon kun koloniismo, kian havas la angla, franca kaj hispana." Misinforma pro sia nekompleteco estas la frazo: "La esperantistoj esperas persvadi UN adopti Esperanton kiel sian oficialan lingvon." En la fino de la teksto *Newsweek* parafrasas deklaron de UN-funkciulo kaj diras: "Se estas iu lingvo, kiu trudiĝas internacie. . . , ĝi estas la angla."

Ni scias, ke por verki tiun etan tekston kunlaboranto de *Newsweek* faris kelkajn intervjuojn kaj vizitojn, telefonis plurfoje al movadaj kompetentuloj kaj, supozeble, trastudis amason da informa materialo ricevita kaj proprainiciate malkovrita. Tiu kunlaboranto havis sufiĉan materialon por kompetente prezenti la lingvon kaj la Movadon al sia legantaro. La miraklo ne okazis, plej verŝajne pro redakciaj starpunktoj, certe pro tiu malnova ordo en la tutmonda komunikado, tiel feroce atakata eĉ de Unesko. Ne konvenas al *Newsweek*, kiu vivas de tio, ke la angla lingvo "trudiĝas internacie", segi la branĉon sur kiu la magazino sidas. Estas ja honoro preskaŭ, kiam *Newsweek* dediĉas al ni eĉ unu linion. Ni kontentu pri tiu ero de la tutmonda komunika torto, same kiel kontentas eta pacifika insulo, kiam ĝi pro murdo aŭ uragano menciigas en mondrenoma periodaĵo kiel *Newsweek*. Tiuj aliaj aferoj, kiel, ekzemple, la objektiveco de la informado, la t.n. esplora ĵurnalismo, senso por novaj aferoj kaj evoluoj, unikeco de niaj kongresoj, fascino de niaj translimaj kontaktoj, valoroj de nia kulturo, la faktoj detruantaj imperiismajn pretendojn de la naciaj grandlingvoj, — ĉio ĉi ne sukcesis kapti la intereson de *Newsweek*, ĉar ĝi ne servus bone ĝiajn interesojn. Se ni volus pli da atento de *Newsweek*, ne sufiĉas okupiĝi pri unu el la grandaj problemoj de la mondo, necesas produkti ian internacian skandalon. Kiel dirite, provizore ni kontentu, ke *Newsweek* malkovris nian ekziston antaŭ ol la zamenhofa lingvo sukcesis centjariĝi.


Vojaĝoj al Brazilo

EN APRILO ni promesis, ke UEA klopodos definitivigi siajn proponojn pri grupa flugvojaĝo en 1981 al Brazilo antaŭ la Kongreso en Stokholmo. Tiurilata negocado kun diversaj flugkompanioj kaj vojaĝagentejoj proksimiĝas al la fino, sed estas neverŝajne, ke ĝi definitivegos antaŭ Stokholmo. UEA traktas kun kvar agentejoj pri entute pli ol dek diversaj versioj de la venontjara vojaĝo al la 66a Universala Kongreso en Brazilio. La celo estas fine elekti kvin aŭ ses aranĝojn, inter kiuj devus troviĝi unu aŭ du malmultekostaj vojaĝeblecoj. Aliaj planoj antaŭvidas pli longan restadon en Sud-Ameriko kaj viziton al kelkaj aliaj landoj, aldone al Brazilo kaj la Kongreso. Neniu el la nun konsiderataj vojaĝeblecoj daŭros malpli ol du semajnojn. Ni faras ĉion eblan, ke la traktadoj baldaŭ finiĝu kaj ke ni povu anonci la definitivajn planojn. La aliĝintoj al la 66a UK certe komprenas, ke la sola emo de UEA ĉi-rilate estas disponigi al ili kiel eble plej favoran partoprenon en la unua UK okazonta en Sud-Ameriko.

Novaj vojoj por la movada junularo

TEJO organizas en 1980 nur unu seminarion. Ĝi okazis ĵus, inter la 15a kaj 21a de junio 1980, pri la temo "Internacia komunikado – aplikado de Esperanto". Ĝi do traktis movadan temon, kun la celo fortigi la internan agadon de TEJO. Spite tion, la seminario ĝuis grandskalan apogon de ekstermovada instanco. Tiu instanco estas Eŭropa Konsilio, kultura kaj socia unuigo de 21 okcidenteŭropaj ŝtatoj. La apogo konsistis el disponigo (dum unu semajno) de la moderna kaj abunde ekipita Eŭropa Junulara Centro, kiu situas duonkilometron for de la sidejoj de Eŭropa Konsilio kaj de Eŭropa Parlamento en Strasburgo.

La Centro disponigis al 34 movadaj aktivuloj lokojn (senpagaj loĝado kaj manĝoj) kaj repagon de vojaĝ-



Seminario en Strasburgo: Trankvila trakto de demandoj

elspezoj. Je dispono estis ankaŭ vidbenda aparataro, salono kun faciligoj por interpretado kaj ĉiuj sekretarioj (fotokopiilo, skribmaŝinoj, multobligilo ks). Per tia ilaro la partoprenantoj eklaboris. La Centro krome dungis profesian interpretiston dum la tuta semajno, por ke la gvidanto de la Centro sekvu la diskutojn kaj kontribuu al ili. La Centro donis al TEJO ankaŭ apartan subvencion por mildigi la konsiderindajn kostojn rapide prepari finan raporton (en Esperanto) pri la tuto.

Jam de jaroj la Komisiono pri Eksteraj Rilatoj (KER) de TEJO organizis seminarion pri lingvaj kaj sociaj temoj kaj por ili ricevis subvenciojn de Eŭropa Junulara Fondaĵo (EJF). Tio ĉesis inter 1976 kaj 1979. La KER-deĵoranto Ian Tarrant restarigis la rilatojn kun EJF per interalie vizito al Strasburgo frue en 1979. Tiel la pasintjara seminario en Austerlitz ricevis subvencion. Tuj post tio, en septembro 1979, TEJO petis unuafoje seminarion en la intertempe konstruita Eŭropa Junulara Centro, kaj proponis Esperantan temon. Tiu peto estis en decembro 1979 aprobita kaj TEJO prenis sian lokon en la listo de ĉ. 35 internaciaj junularaj organizaĵoj, kiuj kunlaboras kun la Centro. En tiu listo troviĝas la plej grandaj kaj fortaj junularaj asocioj de la okcidenta Eŭropo. La unua duonjaro de 1980 entenis multajn preparlaborojn, inkluzive kontaktadon de landaj sekcioj por varbi tridekon da plej taŭgaj partoprenantoj, malkovron de eblaj prelegantoj, trovon de interpretisto, preparakunsidon en aprilo kun reprezentanto de la Centro, kreon de detala programo

KOMITATO DE UEA:

Novaj komitatanoj B

UNUAFOJE la tuta individua membraro de UEA havis la okazon partopreni la elektojn por novaj komitatanoj B de UEA. La voĉdonilo estis dissendita kun la maja numero de nia revuo, kaj devis reveni al la Centra Oficejo antaŭ la 10a de julio. La komisiono, konsistanta el tri individuaj membroj kaj la direktoro de la CO, nombris la voĉojn la 12an de julio.

Ĝis la limdato venis entute 1375 voĉdoniloj, el kiuj 19 montriĝis nevalidaj (6 ĉar la koncernaj personoj voĉdonis por pli ol 7 kandidatoj, 9 ĉar mankis la subskribo, kaj 4 ĉar ne estis uzita aŭtentika voĉdonilo). Restis 1356 validaj voĉdoniloj po 7 voĉoj, kio do entute sumiĝas je 9492 voĉoj. Tiuj voĉoj estis dividitaj jene:

Tonkin, Humphrey	1283
Grattapaglia, Ursula	1224
Støp-Bowitz, Carl	1072
De Smet, Wim M.A.	993
García Blázquez, Félix	981
Lo Jacomo, François	950
Haszpra, Otto	912
Simonnet, Francisko	717
Kühlmann, Gustav	566
neassignitaj (neuzitaj).	794
Entute	9492

Ĉar eblis elekti nur sep komitatanojn B, laŭ la nombro de la ricevitaj voĉoj la Komitaton de UEA, por la laborperiodo 1980-1983, eniras: Humphrey Tonkin (Usono), Ursula Grattapaglia (Brazilo), Carl Støp-Bowitz (Norvegio), Wim M.A. De Smet (Belgio), Félix García Blázquez (Venezuelo), François Lo Jacomo (Francio) kaj Ottó Haszpra (Hungario).

kaj kontaktiĝon kun Eŭropa Parlamento kaj parlamentanoj.

Je la 15a de junio ekis la seminario, kun partoprenantoj kaj prelegantoj el Aŭstrio, Belgio, Francio, FR Germanio, Hispanio, Israelo, Italio, Jugoslavio, Kanado, Luksemburgo, Nederlando, Pollando kaj Svislando. La programo havis ŝtupan karakteron:

1. Varbado de junuloj al Esperanto
2. Taŭga instruado de la lingvo al junuloj
3. Organizado de lokaj junularaj grupoj
4. La rolo de landa sekcio
5. Praktika aplikado de Esperanto
6. Novaj direktoj por la eksteraj rilatoj de TEJO.


Montriĝis, ke la temoj 1, 2, 4 kaj 6 ricevis la plej grandan atenton. Enkondukis la unuan temon s-ro C. Piron (Svislando) per la prelego "La rezisto kontraŭ Esperanto". Sekvis intervenoj kaj diskutoj pri spertoj de varbado flanke de la partoprenantoj, kun posta emfazo de rimedoj pli bone varbi. S-ro Piron poste konkretigis tion per la dua prelego pri strategioj trarompi la reziston. Samtage ni progresis al la dua ŝtupo kaj enkonduke aŭskultis la gvidanton en la Centro, s-ran A. Butler (Britio), kiu prelegis pri la lingvaj kursoj en la Centro kaj pri modernaj metodoj uzataj en la instruado de naciaj lingvoj. Kiel dum la tuta semajno, la diskuto, kiu sekvis tiun prelegon, estis abunda kaj malfacile ĉesigebla. La trian tagon ni spektis la atentokaptajn instrumentadojn de s-ro C. Gacond (Svislando). En vespera sesio li ripetis partojn de la prezento antaŭ la vidbendaj kameraoj. Tiu vidbenda grupo registris preskaŭ tri horojn da materialo pri la seminario, kaj vidigis al ni tri televidajn filmojn.

Sekvis prelegoj de B. Kasini "La rolo de landaj sekcioj" kaj de S. MacGill "Nia aĝo — konstatoj kaj rekomendoj". (La programo estis plenŝtopita dum la tuta semajno, kun nur unu libera duontago.)

regule seminariojn kun subvencioj kaj fortigi la rilatojn kun kelkaj ŝlosilaj neesperantistaj junularaj organizaĵoj. Por pli bone konsciigi nin pri la amaso de tiuj organizaĵoj, la gvidanto de la Centro prezentis ilustritan prelegon pri la ĉefaj eŭropaj kaj internaciaj junularaj asocioj kaj gvidis nin tra la ĝangalo de iliaj mallongigoj. La posta diskuto provis decidi kun kiuj el tiuj organizaĵoj ni plej utile kunlaboru kaj pri kio. En la lasta tago d-ro Corsetti prelegis pri novaj vojoj por KER, konsiderante la ŝanĝon de sinteno okazintan en la lastaj kvin jaroj ĉe la ekstermovada junularo.

En la sama semajno kiel la seminario, en Strasburgo kunsidis Eŭropa Parlamento. TEJO kontaktis la informoficejon de la Parlamento, por peti grup-viziton, kaj skribis al 12 parlamentanoj, kiuj en la lastaj monatoj esprimis sin iel favore rilate al Esperanto. Ĉiuj seminarioj do rajtis viziti la Parlamenton kaj sperti dum unu horo la debaton. Aparte interesa estis la ebleco aŭskulti la seslingvan interpretadon de ĉio. Post tio la grupo estis gvidita al konferenca ĉambro, plene ekipita por interpretado. Tie akceptis nin parlamentano el Britio, s-ro B. Patterson, kiu estis lastatempe nomita raportisto pri plurlingvismo en la Komisiono pri Junularo, Kulturo, Edukado, Informado kaj Sporto.

La grupo estis agrable surprizita, ĉar s-ro Patterson jam dekomence parolis pri komunik-problemoj en la Parlamento kaj la Komunumo. Efektive, lia 45-minuta parolado al ni, kaj la sekva 45-minuta diskuto kaj pridemandado temis ekskluzive pri lingvaj demandoj, interpretado, tradukado, komputila tradukado kaj pri Esperanto. Ŝajnas, ke en la Parlamento oni pli konsciigas pri la demando de komunikado, specife en rilato al la planata plilarĝigo de la Komunumo kaj sekva plimultiĝo de ĝiaj laborlingvoj. Meze de la kunsido aliĝis dua parlamentano, s-ro M. Coppieters (Belgio), kiu esprimis sin tre pozitive pri Esperanto. Kiel



Dum la du lastaj tagoj ni traktis la eksterajn rilatojn, kaj ĝuste tiu ŝtupo estis, laŭ ĝenerala konsento, la plej funde traktita kaj ĝi generis konkretajn planojn. D-ro R. Corsetti, unua-prelege skizis la historion de la eksteraj rilatoj de TEJO de 1959 ĝis la nuno, kun aparta atento al ilia avangarda rolo en la jaroj 1967-72. Tio naskis multan diskuton kaj firman konvinkiĝon, ke TEJO devus restrukturi la eksterajn rilatojn, solvi la volontulan demandon, malcentrigi la laboron, okazigi

raportisto pri plurlingvismo, s-ro Patterson estis petita de la menciita Komisiono prepari dokumenton pri la komunika demando en la Parlamento. Tiu dokumento preskribu gvidliniojn kaj celojn por pli detala studo fare de komisiono aŭ laborgrupo. Montriĝis, ke la 4-paĝa dokumento estis preskaŭ preta kaj s-ro Patterson skizis al ni erojn el ĝia enhavo. Frue en julio la dokumento estos privoĉdonita. Unu plena alineo de la dokumento rekte aludas Esperanton en relative favora



maniero. La dokumento montras, ke la kompilintoj certagrade informiĝis pri la Internacia Lingvo kaj akceptis kelkajn ŝlosilajn argumentojn favore al ĝi. La lasta parto de la dokumento listigas ok punktojn por plua esploro; la sesa el ili petas specife esploron pri Esperanto kaj "aliaj intelektaj kreitaj lingvoj". TEJO

sekvos la progreson pri la dokumento, plene konsciante, ke en ĉi tia afero, kunordigita agado nepre necesas. Ni laboros nur post kaj laŭ interkonsiliĝo kun Eŭropa Esperanto-Centro en Bruselo kaj ni insiste rekomendas al ĉiu alia interesito same fari. TEJO raportis detale al tiu Centro pri la parlamenta vizito en Strasburgo. Fine de la kunsido ambaŭ parlamentanoj ricevis donace la libron *Hirosima Nagasaki*; *Bilda dokumento pri la atombombado*.

En la lastaj jaroj mankis al la junulara movado la necesa trankvilo kaj faciligoj sufiĉe serioze trastudi kaj taksi la propran laboron. EJC donis al ni tiun eblecon. La valoro de tio estis konstatita de la partoprenintoj, kiuj komune konsentis, ke TEJO ĉiujare planu similan aranĝon. Malkovriĝis pluraj homoj pretaj labori je internacia nivelo, precipe pri la eksteraj rilatoj. La seminario certe havos pozitivan eĥon al la etoso kaj laboremo de TEJO en la venonta jaro.

Stefan MacGill

STUDVIZITO AL UNUIGINTAJ NACIOJ:

En oktobro al Nov-Jorko

UEA aranĝas en Nov-Jorko kaj Vaŝingtono Studkonferencon pri Unuiĝintaj Nacioj de la 15a ĝis la 21a de oktobro 1980. Ĝi celas eŭropanojn, kiuj deziras informiĝi pere de Esperanto pri la procedoj kaj medio de UN. Parton de la aranĝo povos profiti ankaŭ usonaj esperantistoj, kvankam oni antaŭvidas unuavice eŭropajn aliĝontojn. La aranĝo volas kontribui al la pliintensigo de la kunlaboro inter la relative forta eŭropa Esperanto-movado kaj la Nov-Jorka Oficejo de UEA, kaj samtempe profundigi la komprenon pri la laboro de UN ĉe tiuj, kiuj partoprenos la Studkonferencon.

Oni restos 4 tagojn en Nov-Jorko kaj 3 en Vaŝingtono. En tiuj du urboj aktivas laborgrupoj pri la rilatoj inter la Esperanto-movado, unuflanke, kaj UN kaj Organizaĵo de Amerikaj Ŝtatoj, aliflanke. La vizitantoj konatiĝos kun tiuj laborgrupoj kaj, kun ilia helpo, surloke studos la funkciadon de UN, ĉefe, kaj de OAS, duavice. (Pli intima kontakto kun OAS povos kreskigi nian influon en la UN-rondoj.)

La programo de la konferenco inkluzivas ĉeeston en grandaj kunvenoj en la sidejo de UN (i.a. la Ĝenerala Asembleo, kiu tiam estos en sesio). Okazos ankaŭ renkontiĝoj kun gravaj laborantoj en UN (Nov-Jorko) kaj OAS (Vaŝingtono). Oni planas informajn prelegojn pri la ĝenerala strukturo kaj unuopaj laboroj de UN, kompreneble ankaŭ kun emfazo pri la lingva problemo tie. La vizitantoj havos inviton por komuna manĝo kun laborantoj en UN kaj kun reprezentantoj de neregistaraj organizaĵoj.

Por ne detrui la homojn per troaj informado kaj diskutoj, kaj ankaŭ por ke la vizitantoj konatiĝu kun Nov-Jorko kaj Vaŝingtono, la konferenco inkluzivas turismadon tra la suda Manhattan (la kerno de Nov-Jorko) kaj vizitojn al moderna artmuzeo kaj al la centetaĝa Empire State Building. Per luksa aŭtobuso oni iros al Vaŝingtono, por konatiĝi kun la vidindaĵoj de la ĉefurbo de Usono (i.a. la Nacia Tombejo Arlington).

Kompreneble, oni renkontos ankaŭ la lokajn esperantistojn, eĉ gastos hejme ĉe ili, kaj havos okazon plifirmigi la transatlantikajn kontaktojn. La partoprenantoj loĝos en altkvalitaj hoteloj (la nov-jorka nomiĝas Hotel Sheraton). La tuto — inkluzive flugon de Amsterdamo al Nov-Jorko kaj reen — kostos 1900 guldenojn por tiuj, kiuj konsentos restadi en dultaj hotelĉambroj. Interesitoj el Eŭropo skribu al la Centra Oficejo de UEA por ricevi pliajn detalojn. La limdato por aliĝoj estas la mezo de septembro.



La celo de la studvojaĝo: Unuiĝintaj Nacioj en Nov-Jorko

Pli ol mil ducent partoprenantoj

EN LA pola urbo Bydgoszcz, de la 28a de majo ĝis la 1-a de junio 1980, okazis la 5a Internacia Esperanto-Renkonto "Bydgoszcz-80". Ĝin aranĝis, okaze de la "Tagoj de Bydgoszcz", la loka filio de Pola Esperanto-Asocio (PEA). Partoprenis 330 gastoj el 11 landoj kaj pli ol 900 membroj de PEA, agantaj en 11 rondoj en la urbo Bydgoszcz.

La riĉa programo konsistis i.a. el la vespero "Bydgoszcz por la gastoj", dum kiu prezentiĝis muzikaj Esperanto-ensembloj "Verda Parnaso", "Niaj Bardoj" (kun la programo "Kantu Baghy") kaj la Koruso de Malnova Kanto en Esperanto de la urba Pedagogia Altlernejo. Dum ŝipekskurso al Toruń okazis folkloro programo en la Etnografia Muzeo tiea. Premiojn dum la literatura konkurso pri la temo "Paco" gajnis 8 aŭtoroj, el kiuj la ĉefan Vesna Skaljer-Race el Jugoslavio. Okazis ankaŭ seminarioj por instruantoj en someraj Esperanto-lernejoj kaj en internaciaj kursoj.

Unu el ili estis gvidata de Andrzej Pettyn, UEA-estraro pri edukado. Oni provis popularigi la periodaĵon *Literatura foiro* aranĝante renkonton kun ĝiaj legantoj. Grandan atenton rikoltis Internacia Konkurso por Esperanto-Kanzono. La ĉefan premion – Pokalon de Muzika Esperanto-Ligo – gajnis Skolta Muzik-Ensemblo "Esperanto" el Garwolin, dum la dua premio iris al la ensemblo "Ora Monero" el Bydgoszcz. La konkurson partoprenis 110 plenumantoj. Specialan pokalon de Muzika Esperanto-Ligo ricevis "Niaj Bardoj" pro la plej altnivela programo ("Kantu Baghy").

La tro riĉan programon kompletigis Internacia Vesperto de Amikeco (kun la ensemblo "Vagabondoj"), koncerto en Pomerania Filharmonio, koncertoj por loĝantoj de Bydgoszcz de la danc- kaj muzik-trupoj el Ĉeĥoslovakio, Hungario, Jugoslavio kaj Pollando. Okazis ankaŭ aparta junulara programo kun partoprenantoj el Bulgario, Ĉeĥoslovakio kaj Germana DR. Dum ĉiuj ĉi aranĝoj prezentiĝis 320 plenumantoj de la programo.

Ĉiuj partoprenantoj ricevis valorajn Esperanto-eldonaĵojn, i.a. notlibron, novan E-prospekton pri Bydgoszcz, kajeron kun premiitaj konkursaĵoj en la literatura konkurso, novan lernolibron *Esperanto por feriadoj*, insignon "Tagoj de Bydgoszcz" ktp. La 31an de majo,

LA DELEGITA RETO:

Utilo eksterduba, modernigo necesa

LA PLEJ GRAVA servopropo de UEA al siaj membroj estas la Delegita Reto. Laŭ la Jarlibro ĝi estas "unika en la mondo". Tio estas vera. Apenaŭ iu alia internacia organizaĵo posedas ion similan. Tion atestas ekz. la surprizo, la miro de ĵurnalistoj, kiam oni dum intervjuo pri Esperanto informas pri ĝia ekzisto kaj funkciado. Oni ofte nomas la delegitojn "konsuloj" de la Esperanto-movado. Apenaŭ iu lando havas tiom da konsuloj, kiom UEA.

Efektive, la Delegita Reto estas la institucio, kiu ebligas al esperantisto libere moviĝi, ĉu skribe, ĉu fizike, en la hodiaŭa mondo multlingva. Ekzistas eble dekoble pli da ekz. parolantoj de la franca en, ni diru, Milano, ol da parolantoj de Esperanto. Sed, kiel trovi la parolantojn de la franca? La esperantistojn oni ĉiam povas trovi dank' al la jarlibra adresaro de la delegitoj. Ĝi pli ol io alia faris Esperanton praktike utiligebla ilo.

La delegita sistemo estas samaĝa kiel UEA mem. Jam en la unua Jarlibro, tiu de 1908, troviĝas listo de delegitoj, vicdelegitoj kaj "sub-delegitoj" en 249 lokoj en 23 landoj. Kurioze estas konstati, ke ekzistis jam ankaŭ speco de fakdelegitoj, sed tiujn oni tiam nomis "konsuloj", kaj ili ekzistis nur por 6 difinitaj fakoj. En 1980 troviĝas 3572 delegitoj diversspecaj en 63 landoj.

Tamen oni povas demandi sin, ĉu la tuta sistemo estas perfekta, aŭ ĉu ankoraŭ perfektigebla?

En la 30aj jaroj oni regule elektis aŭ reelektis la delegitojn ĉiun trian jaron; la Centra Oficejo de UEA ĝustatempe atentigis, ke estas la jaro por elekto de delegitoj. Hodiaŭ oni kvazaŭ forgesis pri tiu trijara ritmo. Eble estus avantaĝo reveni al ĝi. Tio i.a. donus konvenan okazon al delegitoj, kiuj pro aĝo, malsano ktp. ne plu estas laborkapablaj, retiriĝi kun honoro.

Foliumante la Jarlibron oni baldaŭ konstatas, ke en multaj lokoj troviĝas vicdelegito aŭ fakdelegito, sed ne delegito. Eble estis tie delegito, kiu forvojaĝis aŭ mortis, kaj oni ne zorgis, ke ekz. la vicdelegito, aŭ alia taŭga persono, fariĝu delegito. Bezonante servon en tia loko iu membro eble turnas sin al la vicdelegito aŭ fakdelegito, kaj normale tiu plenumas la servon. Aliaj membroj eble hezitus, ĉar ne estas delegito. Estus bone, se la ĉefdelegitoj klopodus normaligi la situacion en tiaj lokoj.

Fakdelegitoj ekzistas pri tre multaj kaj plej diversaj "fakoj", el kiuj kelkaj povas ŝajni iom kuriozaj. Leviĝis la demando, ĉu oni limigu la nombron al listo de difinitaj akcepteblaj fakoj. Sed ne estas facile difini kiuj "fakoj" estu akcepteblaj. Leviĝis ankaŭ la deman-

la poŝtoŝeĉejo Bydgoszcz 1 uzis specialan poŝtan ŝtampojn kun la teksto "5a Internacia Esperanto-Renkonto".

La organizan laboron plenumis 60-persona komitato sub la gvido de mag. Andrzej Grzębowski. Jam oni povas aliĝi al la 6a Internacia Esperanto-Renkonto "Bydgoszcz-81", kiu okazos komence de junio 1981.

LANDA AGADO:

Prelego kiel ĉefa evento

LA 11a PLENKUNSIDO de Centra Laborrondo Esperanto, aliĝinta landa asocio de UEA en Germana Demokratia Respubliko, okazis la 13an kaj 14an de junio 1980 en Magdeburg. Partoprenis ĝin ankaŭ delegacioj de Ĉeĥa Esperanto-Asocio kaj de Asocio de Esperantistoj en Slovaka Socialisma Respubliko.

Tre grava evento estis la prelego de prof. d-ro Georg Friedrich Meier pri "Aspektoj de internacia lingva komunikado". Prof. Meier estas unu el la plej elstaraj lingvistoj, kun internacia reputacio, en Germana DR. Li estas profesoro pri komunikada scienco en Hum-


boldt-Universitato en Berlino, ĉefredaktoro de la plej grava lingvosciencia revuo en la lando, *Zeitschrift für Phonetik, Sprachwissenschaft und Kommunikationsforschung* (Revuo por fonetiko, lingvistiko kaj komunikada esploro), membro de la prezidio de la Centra Konsilantaro pri Lingvoscienco ĉe la Akademio de Sciencoj de Germana DR, aŭtoro de fundamentaj studoj pri lingvistiko kaj multnombraj aliaj kontribuoj.

Antaŭ nelonge (1979) aperis en Akademie-Verlag lia unua libro de la 6-voluma verko *Handbuch der Linguistik und Kommunikationswissenschaft* (Manlibro de lingvistiko kaj komunikada scienco), kiu traktas la lingvon kaj ties ekeston kaj priskribas pli ol 5000 lingvojn de la tero.

En sia prelego, kiu daŭris — kun respondoj al demandoj — entute 3 horojn, li prezentis la plej novajn informojn pri la internacia lingvosituacio, ties evolutendencojn kaj problemojn. Prof. Meier pledis tre verve por la solvo de la lingvoproblemo helpe de planlingvo. Ĉi-rilate li alte aprezis la strukturajn ecojn de Esperanto kaj la ĝisnunajn praktikajn atingojn de la lingvo. La prelego estis ilustrita per multaj mapoj kaj tabeloj. La redakcio de *Der Esperantist* esperas prezenti en formo de serio la ĉefan enhavon de tiu unika prelego.

do pri kontrolado de la kompetenteco de personoj sin prezentantaj kiel fakdelegitoj.

En kelkaj landoj malaperis la ĉefdelegito. Anstataŭe la landa asocio funkcias kiel t.n. "kotizperanto". Sed tiel perdiĝis la reprezenta kaj parte ankaŭ la varbaroloj de la ĉefdelegito, ĉar la landa asocio havas aliajn taskojn ol zorgi pri varbado por UEA kaj administrado de la Delegita Reto. Estas dezirinde restarigi la funkcion de la ĉefdelegitoj en tiuj landoj.



Budapeŝto havas la plej densan reton de la delegitoj.

En multaj landoj delegitoj troviĝas en pli-malpli ĉiuj gravaj urboj kaj en multaj malpli grandaj lokoj. En aliaj landoj, eĉ tiaj kun landa asocio aliĝinta al UEA, estas nur tre malmultaj aŭ eĉ neniuj delegitoj. Estas grava tasko plivastigi la Delegitan Reton en ĉiuj landoj (ĝi ne povas fariĝi tro densa!), sed kompreneble pre-

cipe tie, kie delegitoj estas malmultaj. Unu baro povas esti transpagaj problemoj. Por reprezenti la Asocion delegito devas esti individua membro, kiu regule ricevas kaj legadas la revuon kaj la Jarlibron.

Ĝuste en unu lando kun transpagaj problemoj leviĝis la ideo, ĉu krei pli vastan sistemon de "reprezentantoj de la Esperanto-movado", kiuj ne nepre devas esti membroj de organizaĵo, anstataŭ la delegitoj de UEA. Sendube ja troviĝas multaj homoj, kiuj povus bonege plenumi diversajn servojn, sed kiuj simple ne povas fariĝi delegitoj, ĉar ili ne povas transpagi sian kotizon al UEA. La ideo certe estas pripensinda.

Estas nature, ke delegito en grandurbo kiel Londono aŭ Tokio ricevas multe pli da servopetoj, ol delegito en vilaĝeto. Kelkaj delegitoj en grandaj urboj plendas pri multa laboro. Oni povus imagi dividon de granda urbo en distriktojn, ĉiu kun sia delegito. Kion opinias la grandurbaj delegitoj pri tia ideo?

Fine, aperis la ideo plivastigi la agadkampon de la delegitoj tiel, ke ili plenumu internaciajn servojn ankaŭ por neesperantistoj. Se oni diskonigus tian eblecon, kaj poste informus la lokajn gazetojn pri sukcesaj rezultoj, tio povus fariĝi grava reklamo por la Internacia Lingvo. Tiel oni povus efike utiligi la ofte malmulte utiligatan laborkapaciton, kiun ni havas en nia jam relative tre vasta Delegita Reto.

Ĉi-supre mi tuŝis kelkajn punktojn rilatajn al la delegita institucio. Mi bonvenigus diskuton pri ili, ekz. en niaj kongresoj kaj sur la paĝoj de la revuo.

C. Stöp-Bowitz

Pakistana viglo

DE POST la apero de *Urdua Esperanta lernolibro* en 1976, la movado en Pakistano rimarkinde kreskis. Jam ekzistas Pakistana Esperanto-Asocio; ĝia direktoro, S. Sajjad Ilahi, loĝas en Jhelum kaj ĝia prezidanto, M.S. Cheema, en la eksĉefurbo Rawalpindi. La nacia kongreson en Jhelum (vidu nian revuon de nov. 1978, p. 190) jam sekvis dua kongreso (decembro 1979) en Rawalpindi. Oni nun aktivas en multaj urboj, inkluzive de Islamabad (la ĉefurbo), Lahore, Multan, Peshawar, Murree, Sargoda kaj Muzaffargarh. Urdua versio de la *Ekzercaro* jam aperis. La ĵus pretigita Esperanta kaj urdua vortaro estas eldonota ĉi-jare. Pakistana televido elsendis raporton pri Esperanto la 16an de junio.

Pakistana Esperanto-Asocio (PakEsA) havas Informan Centron (228 Lower Mall, Murree). Pri zorgas ĝin la ĝenerala sekretario de PakEsA, M. Abbasi, kiu ĉi-jare faris informan kaj esploran viziton al ĉiu movada kerno. Li konstatis i.a. ke Esperanto estas instruata en la lernejo A.F. en Jhelum kaj la publika lernejo Siddiqi en Rawalpindi. La centra biblioteko en Murree havas 200 Esperantajn librojn. Interesaĵo pri PakEsA estas ĝia subkomitato "Verkistara Societo", gvidata de H. Jawed Cheema en Rawalpindi. Tiu societo kunordigas verkadon en kaj pri Esperanto.

LA LINGVO KAJ LA PRESISTOJ:

Malbello pro nescio

RIGARDANTE lastatempe aperintajn presaĵojn en la Internacia Lingvo, mi konstatis, ke tro ofte aperas malbelaj kaj neĝustaj supersignitaj literoj. Krome, aperas foje eldiroj en la Esperanto-gazetaro, ke "ĉiam pli oni ekuzas kompostmaŝinojn per kiuj oni ne povas komposti supersignojn". Tiuj eldiroj estas neĝustaj, bazitaj sur nekompletaj informoj pri la tekniko kaj miskompreno pri la historia situacio. Kia estas la efektiva stato?

a. **Neniu** plumbo-kompostejo povis senprepare komposti Esperanton dece. Oni devis ĉiam aĉeti la koncernajn litertipojn aŭ matricojn.

b. Tre multaj foto-kompostejoj, kie oni neniam eĉ aŭdis pri Esperanto, povas senprezare kaj senprobleme komposti Esperanton senerare.

Kio okazis? Unualoke, preskaŭ ĉiuj latinliteraj lingvoj utiligas supersignitajn aŭ specialajn literojn. La angla estas la **sola** oficiala lingvo en Eŭropo, kiu ne utiligas tiajn, kvankam en anglaj tekstoj oni renkontas supersignojn en francaj pruntvortoj. Sume, jam nur en Eŭropo oni utiligas pli ol 15 malsamajn super- kaj

sub-signojn, plus almenaŭ 8 specialajn literojn. En la plumbo-kompostado necesas aparta tipo aŭ matrico por ĉiu supersignita litero, do la eventuale aĉetitaj Esperanto-literoj utilis nur kaj ekskluzive por Esperanto. Tamen, praktike la kompostejoj volonte aĉetis ilin, se prezentiĝis sufiĉe da Esperanto-laboro.

Kontraste, en la foto-kompostado ekzistas du tipoj de literkompletoj:

a. tiuj kiuj inkluzivas la supersignitajn literojn necesajn por unu specifa lingvo (ekz. por la franca: ââêêëë îîôûûçœ);


b. tiuj kiuj inkluzivas apartajn, "flosantajn", supersignojn, pro kio ili taŭgas por komposti multajn lingvojn. (Ekz. ´ ¨ ˆ ˇ ~ ˇ ~ , plus æ œ ø å ß ı.)

Preskaŭ ĉiuj foto-kompostiloj ekipitaj per a. povas esti provizitaj per b. kaj/aŭ per aparta literkompleto en kiu troviĝas i.a. matematikaj signoj, simboloj, grekaj literoj kaj . . . supersignoj. Do, se la kompostejo ne havas kompletan kun liberaj supersignoj, ĝi povas aĉeti ĝin — kaj la investo estas ne nur por Esperanto.

Bedaŭrinde, kutime la presistoj ne sufiĉe konas la eblecojn de la kompostejo, dum ofte la kompostisto ne konas ĉiujn eblecojn de sia kompostsistemo. Tial, se oni diras: "ne eblas", oni **mem**, kune kun la kompostisto, esploru la eblecojn, rigardante signo-katalogojn ktp. Tre ofte eblas!

Tamen ekzistas iuj punktoj kiujn oni atentu, ĉar kompostisto kiu ne kutimas komposti Esperanton ofte ne scias, kiel solvi iujn specifaĵojn. Tial mi ellaboris apartan konsilaron pri la kompostado de Esperanto-tekstoj. Kontraŭ 3 internaciaj respondkuponoj vi povas peti la konsilaron ĉe la Centra Oficejo de UEA.

Wouter F. Pilger



**Bona presisto ne konas "maleblaĵojn" por bonaj klientoj.
Tio validas ankaŭ por la presaĵoj en la Internacia Lingvo.**

Laŭkazaj lingvaj notoj pri „Laŭkazaj lingvaj notoj”

Laŭkazaj lingvaj notoj, de Avo (Alec Venture). Londono: Brita Esperanto-Asocio, 1977. 95p. 21cm. ISBN 0 902756 11 7. Prezo: 9,00 (por Nederlando 9,36) gld., plus sendokostoj 10%.

LA VERKO de Avo konsistas el artikoloj pri tiu kaj alia E-a esprimo aŭ vortuzo, publikigitaj precipe por angle parolantaj esperantistoj iom post iom antaŭe en la revuo *La brita esperantisto*. La artikolaro meritas esti unu el la rekomendindaj konsultlibroj ankaŭ por alilingve parolantaj esperantistoj, kvankam en ĝi estas (kiel mi sube montros) iom da ŝajne dogmaj makuletoj. Mi, internacie nekonata, dum pli ol dudek jaroj ĝuadis plezuron ekskluzive el legado de E-aj verkoj multe pli ol tiun el verkado aŭ tradukado. Pro tio mi povis legi ĝis nun ĉirkaŭ mil E-ajn librojn. Precipe en ĉiuj zamenhofaĵoj, kaj ankaŭ en verkoj de aliaj kompetentuloj, mi fosis plej atente, ne por verki prilingvan libron, sed simple por ellerni, kaj mi kribris el ili kelkdek mil slipetojn da interesaj ekzemploj komparindaj kaj pripensindaj kune kun la fontindikoj.

Mia devizo por la lerno kaj studo de E-o estas: observu ĝin ne nur sinkrone sed ankaŭ diakrone; ne priskribu tro logikeme, nek priskribu tro blinde (por kio estas necesa ankaŭ la skrupula tekstokritiko); kaj starigu teoriojn nur en okazo de nepra neceso tiel, ke ili adaptiĝu, laŭ ĉiuj supozeblaj vidpunktoj, kiel eble plej konforme al la lingvaj faktoj, kiujn oni povas trovi preferataj de la plejmulto de la esperantistaro (t.e. evitu teoriojn nur sur teoremado ne havantajn praktikajn utilecojn). Koncerne tion, mi kredas tute trafaj jenajn Z-ajn konsilojn: "La teoria vidpunkto en E-o neniam povas esti rigardata kiel 'erara'", sed "La tuta esenco de lingvo estas bazita antaŭ ĉio sur interkonsento, tial komuna ĝisnuna uzado devas ludi en lingvo pli gravan rolon, ol seke teoria logikeco" (LR*, p. 14, 17). Idiotismoj kaj iafoje eĉ "eraraj uzoj" povas ricevi, laŭ mi, la "civitanan rajton", se ilin preferas longe imiti la plejmulto, kiel en naciaj lingvoj. Laŭ tiaj starpunktoj mi provis jenan recenzon-kritikon de la verko de Avo. Tio ĉi estas nur parteto el la punktoj, kiujn mi komence intencis trakti.

1. Laŭ Avo, la neuzo de **sia** en la tipo (a) — "La homoj elektis lin (ke li estu) **ilia** gvidanto" — estas logika kaj imitinda (LLN, p. 9). Tio povus esti prava, vidpunte el la "parafrazo". Sed, en efektiveco, la tipo (b) — "La homoj elektis lin **sia** . . ." — laŭ mia statistika esploro

estas multe pli preferata ol la tipo (a) (proksimume trioble ĉe Z kaj kelkdekoble ĉe aliaj). Ankaŭ en la Fundamento jam estas: "Ŝi nomis ŝin **sia** filino" (Ekz § 17). La kaŭzo de la prefero de la tipo (b), mi supozas, estas, ke tiaokaza **sia** estas pli oportuna por la tuja kompreno pri tio, kiun reprezentas la posesivo. Nun oni povus diri sendube, ke (b) estas unu el tiuj kazoj, en kiuj la praktiko superis la harfendan logikon. Tion mi jam detale raportis, kun multe da ekzemploj kaj ties fontoj, en la artikolo "Nuntempaj problemoj de E-a gramatiko" (japanlingve; *La revuo orienta*, jan. kaj feb. 1974).

2. Avo (kaj la piednotanto de FK) insistas, ke **ne devas** estu **devas** ne por esprimi la malpermeson (LLN, p. 31-33). Sed mi kreskis nutrante min per multo el Z-aĵoj, precipe en mia frua tempo de E-lernado, kaj la esprimo **ne devas**, preskaŭ senescepta Z-a kutimaĵo, jam fariĝis neforigebla ero de mia lingva karno kaj sango. (**Ne devas** en la Hachette-a eldono de MT estas ŝanĝita per **devas** ne multloke en la londona eldono; ekz. "fari diferencon inter la bestoj, kiujn oni povas manĝi, kaj la bestoj, kiujn oni **ne devas** (L-eld: **devas** ne) manĝi", Lev 11:47.)

Miaopinie, **ne devas** povas signifi: (a) ne havas la devon (= havas la permeson ne); (b) ne havas la neceson (= ne bezonas); (c) ne havas la permeson (= havas la malpermeson). La unuaj du estas logikaj (la dua devenas semantike de la unua) el la vidpunkto de la lokigo de **ne** kaj de la origina signifo de **devas**. Sed por la signifo de (a) Z diris ĝuste, ekz. "mi **ne havas la devon** sklave submeti min al viaj deziroj" (GD, p. 26), aŭ uzis **povas** ne, ekz. "vi **povas** tute ĝin **ne** uzadi" (LR, p. 46). Por la dua, vd. ekz. "ni **ne devas** miri, ke tia sistemo ne povis trovi amikojn" (FK, p. 246; kp. kun "ni **ne bezonas** timi, ke", LR, p. 31). La tria (ekz. "pri gustoj oni disputi **ne devas**", PE) povus esti nomata idiotismo de Z, sed imitata ankaŭ de aliaj, supozeble pro la oportuno, ke ordinare ne okazas miskompreno ĉe tiuj, kiuj sufiĉe konatiĝas kun la kutimo. (Tamen ankaŭ estas certe, ke ĉi tiun signifon povas doni la "logika" **devas** ne.) Mia vidpunkto havas pli grandan avantaĝon, ekz. en: "Neniu devas tion scii!" (Rab, p. 102), "Nenian trinkaĵon el vinberoj li devas trinki" (Nom 6:3), "Ni neniam devas paroli en niaj kongresoj pri . . ." (OV, p. 379), ĉar ĉe ili oni povas klare kompreni pri la malpermeseco, tute sendepende de tio, al kiu vorto la negacio rilatas.

Aliflanke ankaŭ mi konsentas, ke, se oni esprimas en unu frazo malpermeson unuflanke kaj devon ali-

* V. la klarigon pri mallongigoj ĉe la fino de la artikolo.

flanke, estas bone diri kiel ekz. "Lernolibron oni **devas ne** tralegi, sed tralerni" (Ekz § 16), ĉar tie **devas** rilatas ne nur al **ne tralegi**, sed ankaŭ al **tralerni**, kaj ĉar, se oni diras "**ne** devas tralegi, sed tralerni", **ne devas** rilatus al ambaŭ infinitivoj.

3. Avo (kaj ankaŭ PG kaj PIV) konsilas, ke oni ne uzu **da** antaŭ la artikolo, la montraĵoj, posedaj kaj nombraj pronomoj aŭ adjektivoj, la personpronomoj, **ĉiuj**, **ĉio** kaj **tuta**, aŭ post frakcioj (LLN, p. 55-56). La opinio validas, sed ne ĉiam. Tion mi diras ne sole pro la fakto, ke oni trovas tiujn ekzemplojn ne malmulte ĉe Z kaj aliaj, sed pro tio, ke la uzo iaforte ne estas senbaza. Ni vidu tion ekz. en "kvar metroj **da tiu** ĉi ŝtofo" (Ekz § 14) kaj "**duono da** horo" (F-I, p. 24).

(1) Kiam la vorto **tiu** estas uzata por kvalifiki precipe la t.n. materian substantivon (ekz. ŝtofo, vino k.s.), miaopinie povas okazi, ke **tiu** temas pri la determino de "speco" sola, kaj ne pri la "kvanto" de la difinitaĵo. Tiaokaze, laŭ la principo de (neceso kaj) sufiĉo, oni povus diri ekz. "Mi volas aĉeti du botelojn **da tiu** vino", montrante specimenon en montrofenestro, en kio **tiu** havus la sencon **tiuspeca** aŭ **de tiu sama speco**. La citita ekzemplo el la Ekzercaro, laŭ mi, devus aparteni al ĉi-kategoria uzo.

Rim. 1. Estas kompreneble, ke, se **tiu** signifas "neniu alia (spece kaj kvante) ol tiu determinitaĵo", estas bone diri ekz. "donu duonon **de tiu** ŝtofo kiun vi nun portas en la mano". Rim. 2. En PV, sub **ŝtofo**, oni trovas "kvar metroj **de tiu** ĉi ŝtofo" (kun la signo z), kio tamen estas nepermesebla ŝanĝo. PIV ne registras la ekzemplon el la Ekz, kredeble ĉar ĝi ne plaĉas al la ĉefredaktoro.

(2) Oni nomas la "gramatikan nombron" de la finaĵo **o** "singularo" aŭ "ununombro". Sed koncerne la konkretan nombron, la finaĵo implicas la nombron (x) "ne malpli grandan ol nulo kaj ne pli grandan ol unu" ($nulo < x < 1$); aliflanke, la finaĵo **j** indikas la nombron (y) "pli grandan ol unu" ($1 < y$). Tio induktiĝas el tre multekzemplaj tipoj: (a) "**duono da** horo"^z, (b) "**duona** horo", (c) "**unu kaj duono da** horoj"^z. El la unuaj du, (a) estas preferata de Z kaj (b) de postaj aŭtoroj. Iuj opinias, ke la finaĵo **o** montras la nombron unu; se estus tiel, (b) fariĝus tute memkontraŭa, ĉar **duona** ($\frac{1}{2}$) kaj **horo** (1) ne kongruas unu kun la alia (**duono da** estas kvazaŭkvalifikanto, kiel tuto, esprimanta mezurkvanton, kaj ne parton de difinita (unu) horo, tial, "**duono da** horo" = "**duona** horo"; kp. kun "**dekduo da** horoj" = "**dek du** horoj"; kaj (ĉ) "**duonhoro**"^z venas ankaŭ de **duona horo**. La finaĵo **o** koncerne la nombron tute ne estas elemento pozitiva, ĉar ĝi prenas sur sin la rolon nur en okazo sen **j** (kiu estas vere pozitiva); tiel same ankaŭ koncerne la kazon la finaĵo **o** ne estas pozitiva (dum **n** estas pozitiva). Tion mi povas eltiri ankaŭ el la Z-a diro "La finaĵo 'o' signifas nur simple *substantivon*, nenion pli" (LZ-I, 187).

Krome, da ekzemploj de la tipo (d), "**duono de** jaro", troviĝas sufiĉe multe, kaj kompreneble bona estas ankaŭ ĉi tiu tipo, kiu nature implicas la strukturon

"duono de (unu) jaro" (sk: unu). Unuvorte, (a), (b), (ĉ) kaj (d) estas egale bonaj, havante ĉiu sian bazon. Koncerne (c) estas komparinda ankaŭ la kutima tipo "pli ol unu + subst. en singularo", kiun ni povas analizi per la origina aŭ profunda strukturo "'pli (multe [da . . .])' + ol + 'unu + subst. en sing.'"; kp. kun: "pli ofte ol unu fojon" (F-II, 11), "pli multe ol unu minuto" (OV, p. 28). Vd. ankaŭ: "**pli-ol-unu** personoj" (LR, p. 50), "**pli ol unu** da fiŝoj" (F-IV, p. 216). (PG eksplikas, ke la singularo en "pli ol unu —o" okazas pro la altirforto de la tuj antaŭa **unu**, kio, el la vidpunkto de la surfaca strukturo, povus esti trafa; sed mi restas ĉe mia analizo.)

Krom (c) (kiun mi persone preferas) oni trovas ankaŭ jenajn tipojn (kie, laŭ mi, profundstrukture devus esti krampita parto, kiun tamen oni kutimas elipsi ofte senkonscie): "unu horo kaj duono (da horo)", "unu (horo) kaj duono da horo"; kaj ankaŭ "unu kaj duona horoj" (kiun rekomendas PG). Ĉiuj ĉi tiuj strukture kaj sence ankaŭ havas ĉiu sian bazon. Aldon-dire, kiam oni esprimas la nombron "unu kaj duono" per ciferoj, oni ordinare skribas ekz. "1½ horoj" (kiu ordinare estas legata kiel (c)).

4. Pri **proksima**, **malproksima**, **proksime**, **malproksime** plus **al** aŭ **de**, Avo donas bridan regulon, ke ĉe la stataj verboj **esti**, **ŝajni**, **aspekti** k.s. estas ĝuste diri "**proksima al**" aŭ "**malproksima de**", sed ĉe aliaj verboj (ekz. **kuŝi**) oni diras "**proksime al**" aŭ "**malproksime de**". Ankaŭ PIV preskribas: "Oni ofte trovas post **proksima** la prepozicion **de**: tio estas nelogika, evitinda influo de pluraj naciaj lingvoj" (Rim. sub **proksim/a**; kaj ankaŭ vd. ĉi-sube Rim. 3). Ambaŭ opinioj ŝajnas al mi dogmaj.

(1) Unue ni vidu pri la uzoj de tiaokazaj finaĵoj **a** kaj **e**. Laŭ mi, la adverbo ordinare rilatas al verbo, kaj la adjektivo al substantivo. Kaj ekzemple ĉe la verbo **esti**, **proksima** aŭ **malproksima** uziĝas rilate al la substantiva subjekto, kaj **proksime** aŭ **malproksime** rilate al la verbo, precipe en la okazo, kiam **esti** estas uzata en la senco **troviĝi**, **ekzisti** aŭ **situi**. Kp: "**ĉiu** estas ja por si mem la plej **proksima**" (F-III, 132), "**malproksima** estis ankoraŭ la **tempo**" (F-IV, 181); "li **estis** nun jam **proksime**" (F-I, 156), "li **estis** sufiĉe **malproksime**" (F-IV, 36); kp. ankaŭ kun: "ŝi ne **estas** ĉi tie" (RB, p. 51), "la marĉistino **estis** **hejme**" (F-IV, 93), "la fenestroj **estis** tre **alte**" (F-II, 57), "**troviĝi** tute **apude**" (F-IV, 44), "ĝi ne **troviĝis** **proksime**" (F-III, 88).

(2) La uzo de **al** aŭ **de**, laŭ mi, dependas de tio, kion la esprimanto intencas montri per ĝi: ĉu "direkte **al/ĝis**" aŭ ĉu "**deloke de**". Vd: "la afero estis **en proksimeco de** malnova kavalira bieno" (F-II, 152), "**troviĝi en malproksimeco de** apenaŭ kelke da paŝoj **de** la ŝtuparo" (M, 161). Kp: (i) "ŝi **estis** tute **proksima al** la preĝejo" (F-I, 169); (ii) "ŝi **ŝajnis al** ŝia humoro **pli malproksima**" (BV, p. 18; sed eventuale ĉi tiu **al** povus rilati nur al **ŝajni**); (iii) "Fabelo kaj realo **estas** tre proksimaj unu **de** la alia" (F-III, 99; PIV pro sia supre

citita opinio ŝanĝas la **de per al**; vd. ĉi-sube Rim. 3); (iv) "Odense ne **estas** ja multe pli **malproksima de** Kopenhago" (F-IV, 132); (v) "homoj, kiuj **estis al** ŝi proksime parencaj" (RB, p. 34; = parencaj proksime **al** ŝi); (vi) "ŝi **estis tre malproksime ĝis** tie" (F-IV, 112), (vii) "ŝi **estis jam proksime de** la pordo" (M, p. 181), (viii) "ili **estis jam malproksime de** la tero" (F-I, 166).

Rim. 1. Ne ĉiujn kombinojn oni uzas. El la supraj ok tipoj, (ii), (iii), (v) kaj (vi) estas sporadaj ĉe Z (la aliaj estas tre oftaj), sed iom pli oftaj ĉe aliaj aŭtoroj (ankaŭ la aliaj estas oftaj). Kaj, miaopinie, ne ekzistus la "esenca" diferenco rilate la verbon inter "esti (precipe en la senco de **situi** aŭ **troviĝi**) + proksime + **al**" kaj ekz. la tipo "pli proksime **al** la pordo ili **staris**" (F-II, 63), ankaŭ da kiaj ekzemploj ni trovas ne malmulte ĉe Z. Rim. 2. La tipojn (vii) kaj (viii) oni



Tentoj kaj potencoj de la konversacia lingvo: Seminaria diskutrondo en Strasburgo (vidu la paĝon 123)

trovas plej ofte ĉe Z kaj aliaj. Kp. ankaŭ "esti **flanke de** li" (F-IV, 186); "ĝia vizaĝo troviĝis tute **proksime antaŭ** ŝi" (F-IV, 117); "esti **proksime tuj post** la pordego" (Rab, p. 18). Aldone, oni povas diri, ke eĉ ĉe aliaj verboj, la kombino "proksime + de" estas pli kutima ol "proksime + al". Vd. ekz. "**sidi** plej proksime **de** li" (F-I, 120), "**kuŝi** tre proksime **de** ĝi" (F-II, 33), "**stari** plej proksime **de** la fajrejo" (F-III, 130). Rim. 3. Origine, "proksima/e" signifas: "apartigita/e en (aŭ per) mallonga distanco". Kaj: "proksima/e (en la direkto = direkte) **al**"; aliflanke, "en mallonga distanco mezurata **de**" > "en proksimeco **de**" > "proksima/e **de**" (vd. supre, komence de (2)). Tial la opinio de PIV citita supre estas apriora dogma, ignoranta ĉi tiun de mi aludititan diferencon. Sed kiam oni deziras forte doni al **proksima** ekzemple la figuran sencon **simila**, tiam "proksima **al**", analogie al "simila **al**", ŝajnus pli natura. En la ekzemplo citita el Z supre ĉe (2-iii) oni (almenaŭ mi) tamen povas elflari la nuancon: "Fabelo kaj realo estas tre **mallongdistance apartigitaj** unu **de** la alia"; kaj estas ne necese ŝanĝi **de per al**.

5. Pri **ami** kaj **ŝati** Avo (kaj ankaŭ PIV) konsilas al ni diri (a) **ami ĉokoladon** kaj ne (b) **ŝati ĉokoladon** (nek

ŝati + inf.). La konsilo certe konformas al la kutimo de Z, kaj tion sekvis ne malmulte da vortaroj kaj lernolibroj. Ankaŭ mi longe imitis la kutimon. Sed la tipo (b) oftigas iom post iom kaj ĉiam pli kaj pli precipe lastatempe. Ŝajne fronte al tiu sinkrona fakto, la novaj internacie furore konataj lernolibroj komencis akcepti en si la novan tajdon de la uzo. Tion oni povas trovi, ekzemple, en V. Setälä: *Privilegia vojo*; F. Szilágyi: *Konversacia Esperanto-kurso*; I. Szerdahelyi: *Esperanto I*; J.C. Wells k.a.: *Jen nia mondo*. Ankaŭ en *Paŝoj al plena posedo* (kolekto de lernolegajoj, komp. de W. Auld, aglomere el diversaj spertaj verkistoj), *25 jaroj* (antologio de premiitaĵoj en la belartaj konkursoj, red. de Auld kaj V. Benczik) kaj aliaj modernaj verkoj oni trovas la ekzemplojn.

C. Piron (J. Valano) konfesas, ke li, kiu multjare uzis E-on en la kvin mondpartoj, neniam aŭdis la verbon **ami** en la uzo de (a), sed oftege aŭdis en similaj okazoj la verbon **ŝati**, kaj konkludas, ke verŝajne do okazis drasta semantika evoluo de tiuj du vortoj (vd. *Ĉu vi kuiras ĉine?*, p. 134). Kaj en la verko ankaŭ li uzas **ŝati** tiel kiel (b). Ankaŭ Wells priskribas (laŭ la de li preferata formo "deskriptas") jene: "Aŭ tio okazis ĉar oni volis, konscie aŭ ne, starigi semantikan izomorfecon (t.e. formale saman strukturon) kun la nacia lingvo. Tiel, ekzemple, oni emis uzi **ŝati** en senco kovrata, en la klasika lingvo, de **ami (mi ŝatas ĉokoladon)** . . ." (*Lingvistikaj aspektoj de Esperanto*, p. 57). Koncerne la priskribon estas leginde ankaŭ: "La verbo **ami** plej ofte en la hungara lingvo, same kiel en la franca lingvo, respondas al la esperanta verbo **ŝati**" (Szilágyi, *Koko krias jam!*, p. 184).

Nu, en tiaj tiklaj okazoj, mi kutimas reveni al la Z-aj instruoj, el kiuj vi ankaŭ bonvolu pripensi jenajn: "Ne sole en naturaj lingvoj, sed ankaŭ en lingvo artefarita ĉio, kio estas uzata de la plejmulto da bonaj verkistoj, devas esti rigardata kiel bona; ĉar se ni postulos ĉiam nur logikon **absolutan**, tiam la libera uzado de lingvo artefarita fariĝos tute ne ebla", "La plej grava leĝdonanto estas la uzado" kaj "Leĝdonanta ĉiam estos nur la voĉo de la plejmulto" (LR, p. 26; OV, p. 573, 64). Tial mi proponas, ke la diskutatan problemon decidu la esperantistaro mem, en la plua praktika lingvouzado, kvankam mi persone jam nun inklinetas akcepti la novan uzon.

Koiĉi Ŝimizu

MALLONGIGOJ

BV: La batalo de l' vivo (2a eld). **Ekz**: Ekzercaro. **F**: Fabeloj de Andersen (I, IV: Herolda eld; II, III: ECL-eld). **FK**: Fundamenta krestomatia (17a eld). **GD**: Georgo Dandin (2a eld). **LR**: Lingvaj respondoj (2a eld). **LZ**: Leteroj de Zamenhof (kompilis Waringhien). **M**: Marta (2a eld). **MT**: Malnova Testamento [**Lev**: Levidoj, **Nom**: Nombroj (el MT, citaĵoj signitaj per "Lev" aŭ "Nom" estas el Hachette)]. **OV**: Originala verkaro. **PE**: Proverbaro Esperanta. **Rab**: La rabistoj (1-a eld). **RB**: La rabeno de Baĥaraĥ kaj La gimnazio (2a eld). **Rev**: La revizoro (2a eld).

PV: Plena vortaro (el SAT). **PIV**: Plena ilustrita vortaro (el SAT). **PG**: Plena gramatiko de Esperanto (de Kalocsay kaj Waringhien). **LLN**: Laŭokazaj lingvaj notoj (de Avo). **E**: Esperant'. **Z**: Zamenhof.

Literaturece pri literaturo

Recenzas S. Bakrin (Soveta Unio):

Enkonduko en la originalan literaturo de Esperanto, de William Auld (1924-). Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1979. 101p. 20cm.

Kiam oni studas la historion de internaciaj lingvoj post la apero de Volapük (1879), oni ofte havas la strangan senton: multaj el tiuj lingvoj limigas sian funkciadon al okupoj pri si mem. Tiu memokupiteco iam kreskas al la grado de siaspeca lingva narcisismo: la "literaturo" de tiaj lingvoj estas senĉesa vico de prilingvaj notoj, proponoj, polemikaĵoj ktp. Sed la vera esenco de lingvo estas perdita, ĉar ĉiu lingvo ekzistas ne por tiu introvertita diskutado, sed por perado de kromlingvaj, eksterlingvaj bezonoj.

Esperanto jam dekomence estis escepto. Ĝia karakterizaĵo estis krea potenco, kiu stimulis ne prilingvan mediton, sed perlingvan verkadon. W. Auld prave rememorigas la esperantistan ŝercon, kiu estis populara jam inter la unuaj adeptoj de la lingvo: "Vi lernas Esperanton nur dum tri semajnoj? Montru do al mi viajn poemojn!" (p. 14).

El tiaj kreaĵoj aperis la tuta Esperanta literaturo, kiu kulminas en la formo de la originalaj poezio kaj prozo.

La libro de W. Auld priskribas la evoluon de la Esperanta originala literaturo, dividante ĝin en sekvajn periodojn: originala literaturo 1887-1930, Kalocsay kaj la skolo de *Literatura mondo*, originala prozo 1930-1977, originala poezio 1950-1977. La periodigo estas iom arbitra, sed tio ĝenus nur literaturan esploriston, kiu dezirus kompari la informojn de Auld kun tiuj de, ekzemple, *Esperanto en perspektivo* (kie ni trovas alian perioddividon: 1887-1918, 1918-1945, 1945-1972).

La priskribo de la Esperanta literaturo ĉe Auld estas mem literatureca, kun multaj trafaj citaĵoj. La aŭtoro ne konsideras sian libron katalogo de ĉiuj aperintaj verkoj; por la leganto estas prezentataj nur la verkoj, kiuj elstaras en la literaturo. Pro tio la libro povus servi ankaŭ kiel gvidilo por ĉiu esperantisto deziranta konatiĝi kun la klasikuloj de la Esperanta beletro.

Apartan intereson havas la ĉapitro pri "La rolo de originala literaturo en la historio de Esperanto". Tamen ne ĉiuj asertoj de la aŭtoro tie estas apogeblaj. W. Auld emfazas la emocian rilaton de esperantistoj al "sia kara verda lingvo"; el la emocioj venas la arto ĝenerale kaj la literatura verkado speciale. Vere. Sed en tiu prezento iom perdiĝas la primara celo de la Internacia Lingvo. Se Esperanto estas destinita iĝi la

lingvo por tutmonda komunikado, la dua lingvo por ĉiuj, oni ne povas esperi, ke la tuta homaro ĝin akceptos emocie: ju pli internacia estos la lingvo, des malpli "verda" iĝos ties koloro. La t.n. "fina venko" okazos ne tiam, kiam oni sukcesos ĉiujn entuziasmigi pri Esperanto (tio estas psikologie ne ebla), sed kiam eĉ lingvaj indiferentuloj eksentos praktikan utilecon de la Internacia Lingvo.

Mendu ĉe UEA: 15,00 (por Nederlando 15,60) gld., plus sendokostoj 10%.

Ekscite tra ĝangalo

Recenzas Boris Kolker (Soveta Unio):

Kumeŭaŭa, la filo de la ĝangalo, de Tibor Sekelj. Antverpeno/La Laguna: TK/Stafeto, 1979. 95p. Ilus. 21 cm. Belliteratura eldonserio 42. ISBN 90 6336 018 5.

Reapero de Tibor Sekelj sur la libromarkato estas ĝoja evento. Ĉi-foje temas pri averio de riversipeto, kiu igis grupon da vojaĝantoj resti dum kelkaj tagoj en brazila ĝangalo. Por la homoj, nespertaj en ĝangala medio, tio estus pereiga akcidento. Sed feliĉe, ilin trafas kaj helpas indiana knabo, lerta, multscia kaj nobla. Kune kun la aŭtoro ni observas ekzotikajn bestojn kaj plantojn, ĉasas, travivas danĝerojn kaj plie konvinkiĝas, kiom multe povas doni la naturo, se oni perfekte konas ĝin kaj rilatas al ĝi dece. Mi ne scias, ĉu la aŭtoro vere havis tiajn aventurojn kaj, se jes, ĉu en tiaj detaloj, sed ĉio estas volonte kredebla. Mi opinias, ke recenzante oni parolu pri la lingvaĵo en du kazoj: aŭ se ĝi enhavas multajn nekutimaĵojn, aŭ se ĝi lamas. Tie ĉi estas nek tio, nek alio, sed normala flua Esperanto. La tipografia laboro estas super laŭdoj.

Mendu ĉe UEA: 9,60 (por Nederlando 9,98) gld., plus sendokostoj 10%.

Gaeloj kaj gigantino

Recenzas Charles R.L. Power (Nederlando):

La noktmeza kortumo (1780), de Brian Merriman (1757-1805). El la irlanda (gaela) trad. Albert Goodheir. Lelystad: Vulpo-Libro, 1980. 36p. Ilus. 21 cm. ISBN 90 70074 07 9.


Nuntempe la reciproka ligo inter infanabundo kaj malriĉo estas tiel konata, ke ĝi fariĝis jam kliŝo, sed la kliŝo ne estas aplikebla al ĉiuj socioj. Ĉi tiu poemo pri-versas nacion, kie malriĉo, ĉasto kaj formigrado signifas minacan malkreskon de la loĝantaro — problemoj ankoraŭ hodiaŭ ne malaktualiĝinta por Irlando.

La rakontanton de la poemo kaptas mita gigantino, kiu lin venigas al kortumo sub la reĝino de la feoj, kiel reprezentanton de la irlanda viraro. Tie plendas irland-

aninoj pri la needziĝemo de junuloj kaj pri la manko de amfortoj ĉe la viroj, kiuj edziĝas maljunaj. Aŭdiĝas ankaŭ kordoloraj kritikoj de la katolika eklezio, al kiu tiel multaj irlandaj viroj "edziĝas" kiel pastroj.

Tradukoj el la gaela, laŭdire la plej antikva lingvo en la okcidenta Eŭropo sed preskaŭ neniigita per subpremo fare de la najbara insulo, tre malabundas en Esperanto. La traduka talento de Goodheir igas bedaŭri tion. Tre rapide legiĝas la poemo, en kvarakcentaj asonancaj versparoj, kiuj evitas la monotoncon, oftan en simile longaj poemoj kun pli rigida verstekniko.

Mendu ĉe UEA: 4,20 (por Nederlando 4,37) gld., plus sendokostoj 10%.



Disko pro kiu aliaj envios nin

Recenzas Wouter F. Pilger (Nederlando):

Songpoemo pri ponto kaj aliaj kantoj. Kantas la koruso Hljómeŭki. Piana akompano de Jónas Ingimundarson. Tradukoj de B. Ragnarsson, S. Sigurdsson k.a. Reykjavík: Islanda Esperanto-Asocio, 1979. 30cm. 33t/m. Duflanka. Stereofona. IEA-7901.

Jen disko malfacila por recenzi. Ĉar ĝi estas tiel... alia. Unue jeno: ĝi estas unu el la plej perfektaj diskoj iam produktitaj en Esperanto. Laŭ tekniko, laŭ kantistoj, laŭ aranĝo. Sed ĝi estas tre... islanda. Almenaŭ, tion mi devas supozi. Esplorante per konsultverkoj ĉi tie disponeblaj, mi eksciis, ke ne nur la literaturo de Islando

estas tre malnova kaj multilate impona, sed ankaŭ ĝia tradicio pri kantado. Tamen, Islando restas fora, fremda lando kun nekonata arto. Ankaŭ iuj kantoj sur tiu ĉi disko unua-aŭde impresas kvazaŭ venantaj de fora, fremda mondo. Eble tio estas iluzio, sed mi kredas ke tiu ĉi kolekto de kantoj vidigas al mi la islandan pejzaĝon: impona, firma, sed ne tro kruda, rokaro, kun unu-du papilioj dancantaj je ĝia fono. La aspekto de la elvokita pejzaĝo, tamen, ŝanĝiĝas laŭ mia animstato. Indas aŭskulti post tago gaja kaj post tago malĝoja. Kiel bona artverko, ĝi ne restas sama.

La titola peco estas korusa muzik-pentraĵo surbaze de inspira poemo, kiun Baldur Ragnarsson (kiu tradukis ĝin kaj plurajn aliajn pecojn) laŭtlegas antaŭe. Tiu verko, kiun la sama koruso plenumis vive dum la Rejkjavika UK, igis tiutempan recenzanton skribi: "Tiu virtuozaĵo..., bazita sur juvela poemo, havas ĉiujn kvalitojn de nova himno de la Movado..."

La aliaj pecoj, prezentitaj koruso aŭ sole, estas popolkantoj, en artisma sed ne tro artigita aranĝo, aŭ artkantoj kun popola, natura, praa fono. La tekstoj estas ĉiuj presitaj sur la kovrilo, sed ankaŭ sen tio la prononco estas ĝenerale perfekte komprenebla.

Skribonte ĉi tion, mi devis konstati ke la islanda muziko estas praktike nealirebla ĉi tie. Imageble, aliloke estas same. Ĉi tiu disko, kvankam ĝi estas esperantlingva, povus ankaŭ inter neesperantistoj konatigi parton de la islanda kulturo. Sed ni ĝoju, ke ni, krome, povas kompreni la tekstojn.

Mendu ĉe UEA (kiu estas la ĉefa distribuanto): 27,90 (por Nederlando 32,92) gld., plus sendokostoj 10%.

Imuni al la manio

Recenzas Probal Daŝgupto (Hinda Unio):

Participoj kaj konjugaciaj formoj en Esperanto, de Olav Reiersøl. Oslo: La aŭtoro, 1980. 91p. 30cm.

Gramatikistoj estas ofte pedantaj. La Movado devus timi pedantecon, tiom malvarban, pli ol peston. Necessas rezisti vortludan manion aŭ emon nombri butonojn sur pioniraj jakoj. Feliĉe, pro la almenaŭ parta rejunigo de la Movado, oni konscias pri tio. Oni ĉesis i.a. diskuti la pedantan temon "participoj". Ĉi tiu libro provas relanĉi tiun temon. Bonŝance, ĝi estas verkita tiel malpublike, ke komprenos ĝin nur veteranoj kaj gramatikistoj. Ni esperu do, ke novaj esperantistoj restos imunaj al la manio ata-ita.

Veteranoj scivolos, kion la verko alportas. Ĝi estas iom originala pro tio, ke ĝi aspiras al scienca esplorado. Ĝi tonas senpasie kaj citas el *Aspect* de B. Comrie. Sed ĝi ne estas kontentiga esploro. Citinte kun aprobo (p. 12) regulon de Vilborg pri "priparolata tempo", oni jam sur p. 13, ĉe malkonfirmo de tiu re-

gulo, senaverte retiras ĝin kaj akuzas Kalocsay pri nekapablo elpensi ion pli bonan. Same strange, la aŭtoro malgraŭ kono de Comrie ne konstatis, ke **rezulto** estas fakvorto en priaspektaj studoj (p. 9), kaj ke **perfektiveco** (p. 8) ne havas saman difinon en ĉiuj nacilingvaj gramatikoj. La plej grava manko estas ignoro de esploroj pri la "tempo", kiuj firmigas la kalcioĉan konjekton, ke la "nuntempo" estas aspekto de komenciteco-nefiniteco.

Mendu ĉe UEA: 12,90 (por Nederlando 13,42) gld., plus sendokostoj 10%.

Tri fakaj libroj de William F. Orr

Recenzas Jan Otto de Kat (Nederlando):

Enkonduko al ne-eŭklidaj geometrioj, de William F. Orr. Liège: Someraĵaj Universitataj Kursoj, 1976. 25p. Ilus. 30cm.

Enkonduko al finiaj geometrioj, de W.F. Orr. Liège: SUK, 1976. 25p. Ilus. 30cm.

Pluredroj kaj plurĉeloj, de W.F. Orr. Liège: SUK, 1976. 31p. Ilus. 30cm.

Kiu interesiĝas pri la matematiko, kaj precipe pri la geometrio, spertos multan plezuron legante la supre menciitajn kursotekstojn. Orr montriĝas kompetentulo, kiu povas prezenti malfacilajn temojn laŭ kompreniga maniero.

La aŭtoro ĉiam en la komenco koncize priskribas la historion de la faka regiono. Jam tiuj mallongaj skizoj estas interesaj. Montriĝas, ke al la verkinto ne mankas humura sento, kiu ja ne bezonas foresti el matematikaj eseoj.

En la unue menciita kursoteksto la aŭtoro kondukas nin ekde la kvin postulatoj de Eŭklido, tra la de Playfair modifita kvina postulato, al la ne-eŭklida matematiko de Gauss, Bolyai kaj Lobaĉevski, pri kio li ofertas sinoptikan resumon.

Bona eltrovaĵo en la komenco de la dua libro estas la du tute diferencaj ekzemploj el la ĉiutaga vivo — aŭtobuslinioj kaj eksperimentkontrolo en kafofirmo —, kiuj povas esti transformitaj al ekzakte la samaj matematikaj formuligoj. Tiuj specoj de ekzemploj ĉiam estas tre instruaj, ĉar ili demonstras la rilaton inter la matematiko kaj la praktika vivo. La aŭtoro per tio prave eksenigas la matematikon de ĝia kelkfoje malagrabra abstrakteco.

Ke ankaŭ la temo de la tria traktaĵo povas interesi eĉ fakulojn, montru tion la fakto, ke mi iam vidis amikon, kiu konstruis en tri dimensioj el rigida papero la ĉefajn el la pluredroj, kiuj estas traktataj ĉi tie. Se mi donus al li ĉi tiun kursotekston, li eble interesiĝus pri Esperanto. La aŭtoro traktas la temon interese kaj indikas ankaŭ ĝian filozofian fonon, ofte aluditan en la mezepoko. Domaĝe ke li ne mencias la pensojn de

Kepler (1571-1630), kiu konjektis rilaton inter regulaj pluredroj kaj la distancoj, je kiuj la planedoj ĉirkaŭiras la sunon, per kio li eĉ kredis esti trovinta sekreton de la universo!

La maniero, laŭ kiu SUK eldonas la kursotekstojn, ŝajnas taŭga. Mi trovis kelkajn tajperarojn, kiuj estus eviteblaj en ekstra tralego. Ili tamen nenie ĝenas, krom tiu en la kvina postulato de Eŭklido, kie mia opinio post la lasta komo devas esti skribite "malpli" anstataŭ "pli". Cetere mi konjektas, ke tiu ĉi tuta frazero povas esti ellasita. La verkinto uzas kelkajn memkonstruitajn vortojn (ekz. "antiklasta"), kiujn mi opinias bonaj pliriĉigoj de la fakvortaro. Indeksoj, suplementoj kaj ampleksaj bibliografioj kompletigas la verkojn, kio faras la tuton ankoraŭ pli valora. Estas donitaj ĉe ĉiu ĉapitro ankaŭ ekzercoj, kiuj estas tre utilaj kaj instruaj.

Mi prenas la okazon denove atentigi pri la aktiveco de Someraĵaj Universitataj Kursoj en Liège, kiuj stimulas la eldonon de tiaj utilaj kursotekstoj je alta scienca nivelo. De mia kolego d-ro R. Vetter mi eksciis, ke li igis la Centran Bibliotekon de la Universitato en Delft (Nederlando) akcepti la eldonaĵojn de SUK en sian libron. Ago imitenda!

Mendu ĉe UEA: La unuaj du libroj po 6,00, la tria 8,40 (por Nederlando po 6,24 kaj 8,74) gld., plus sendokostoj 10%.

Riĉo sen artifikoj

Recenzas Vladimir V. Samodaj (Soveta Unio):

Ĉu li bremsis sufiĉe?, de Johán Valano (pseŭdonimo). Antverpeno/La Laguna: TK/Stafeto, 1978. 128p. 21 cm. Belliteratura serio 39. ISBN 90 6336 008 8.

Post la krimromano *Ĉu vi kuiras ĉine?*, jen estas nova originala verko de Valano. Kiel la unua (aperinta en 1976) ankaŭ tiu ĉi estas unu el la plej multnombre vendataj libroj en la lastaj jaroj. Tiu populareco ĉe la legantaro estas per si mem elokventa kaj enviinda "recenzo".

Pri kio rakontas la nova krimromano? La ĉefarkitekto de malnova urbo, ĝia verva renoviganto kaj rekonstruanto, amato de duonurbo kaj malamato de la alia duono, pereis kun sia edzino en aŭtomobila akcidento sur kruta montovojo. "Ĉu li bremsis sufiĉe?", oni demandas sin. Plej verŝajne jes, ĉar li ja estis bonega stiranto. "Murdo", konkludas la polico. Sed, kiu povis kompolti tion, kiu deziris lian morton? Multaj. Tiuj kaj aliaj. Tamen, montriĝos, ke la solvo de la mistero sin kaŝas aliloke.

La lingvaĵo estas tute natura, flua, sen malnecesaj artifikoj. Tamen, ne malriĉa. Male. Enestas provoj krei dialektaĵojn sed ankaŭ tio ne tendas. La libro havas bonan aspekton. Eble nur la komposto estas iom tro densa. Preseraroj preskaŭ tute mankas.

Mendu ĉe UEA: 12,00 (por Nederlando 12,48) gld., plus sendokostoj 10%.

Laste aperis...

Aŭtuno en la printempo (1932), Ba Jin (1904-). El la ĉina tr. Laŭlum. Beijing: El Popola Ĉinio, 1980. 13+97p. Ilus. de Yao Youxin. 21cm. 10-Es-1525. Romano pri malfeliĉa amo, verkita laŭ inspiro de *Printempo en la aŭtuno* (1931) de Julio Baghy. Kun enkondukaj vortoj de la aŭtoro, pri la cirkonstancoj de verkado kaj la evoluo de post eldoniĝo de la romano. Prezo: 10,80 gld.

Cetacoj, La, W.M.A. De Smet (1932-). Liège: Someraĵaj Universitataj Kursoj, 1976 (fakte 1979). 2+104p. Multobligita. Ilus. 30cm. KT 28. Pri balenoj, delfenoj kaj aliaj marmamuloj. Prezo: 18,90 gld.

Ĉinaj popularaj ludiloj. Kolorilustraĵoj de Tian Yuan. El la ĉina. Beijing: Fremdlingva Eldonejo, 1980. 78p. (nenumeritaj). 22cm. Bindita. 84-Es-492. Simplastilaj pentraĵoj de argilaj, porcelanaj kaj aliaj ludiloj. Prezo: 3,90 gld.

Ĉu ne eblus ĉi tiel?; por facilaj kontaktoj kun move handikapi-toj, Maurits Wagemans. El la nederlanda tr. Esperanto-studentoj, Universitato de Amsterdamo. 32p. Ilus. 17cm. Konsilaro pri helpo al personoj en rulseĝo aŭ kun lambastono en diversaj cirkonstancoj. Prezo: 3,90 gld.

De Z al A en tri epokoj (1970), Fay Koppel. Melbourne: Esperanto-Federacio de Viktorio, 1978. 1+20p. Multobligita. 21cm. Teksto de prelego pri la Esperanta literaturo, de Zamenhof ĝis Auld. Prezo: 4,50 gld.

El ĉina poezio. Red. kaj el la ĉina tr. Saint Jules Zee. Beijing: El Popola Ĉinio, 1980. 14+135p. 21cm. 10-Es-1526. Antikvaj kaj modernaj poemoj, kun klarigaj notoj. Kun enkonduko pri la ĉina metriko. Prezo: 10,80 gld.

Hieroglifo, Julia Pióro (1902-). Antverpeno/La Laguna: TK/Stafeto, 1979. 96p. 21cm. Belliteratura Eldonserio 41. ISBN 90 6336 017 7. Dek kvin noveloj kaj fabeloj. Prezo: 9,60 gld.

Infana raso, La (1956), William Auld (1924-). Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1980 (3a eld., fotorepreso de la 2a eld.). 121p. Ilus. de George McIntosh. 20cm. Poemo 25-ĉapitra pri la homo kaj ties loko en la universo. Prinotita. Inter la esencaj verkoj de la Esperanta literaturo. Prezo: 15,90 gld.

Metropoliteno (1933), V. Varankin (1902-1937). El Esperanto tr. Marta Evans. Antverpeno: TK/Stafeto, 1979. 312p. 21cm. ISBN 90 6336 016 9. Anglalingva traduko de unu el la plej gravaj originalaj romanoj en Esperanto. Prezo: 25,80 gld.

Nuancoj; poemoj, Kazimierz Szczurek (1927-) kaj Lina Gabrielli. Ascoli Piceno: Gabrielli, 1980. 125p. Ilus. de Zbigniew Józwik. 20cm. Plejado 13. Du poemaroj: la unua estas de melodiema polo, la dua de emocia, simplaversa italino. Antaŭparolo de W. Auld. Prezo: 14,70 gld.

Rikardo tria (1592?), Vilhelmo Ŝekspiro (1564-1616). El la angla tr. John Francis. Glasgow: Kardo, 1980. 177p. (nenumeritaj). 21cm. ISBN 0 905149 10 4. Pri ambicia, insidema angla reĝo, kiu laŭvice murdas aŭ murdigas ĉiujn rivalojn por la trono. Enkonduko donas la aŭtentikan historian fonon, kies akordo kun la enhavo de la dramo estas disputata. Prezo: 19,50 gld.

Unions inter états — dans quel but? Pisa: TEJO/KER, 1980. 16p. Ilus. 21cm. Resuma traduko de Interŝtataj unuiĝoj — kiu-cele? (vd. ĉe Politiko). Prezo: 3,00 gld.

LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando, ne akceptas mendojn, kiuj ne atingas **la minimuman mendosumon de 15,— guldenoj**. Al la netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 4% kaj al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 18% por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por la sendokostoj. Tamen, la sumo de la sendokostoj estas **minimume 3,— gld.**

Kalendaro

Kien iri poste?

Aŭgusto

(Kompletigo de la kalendaro, kiu aperis en la marta numero.)

16-30 Laborbrigado, Schlüchtern/Fulda, FR Germanio (J. Hoffmann, Heinrichstr. 55, D-6100 Darmstadt)

20-24 Turismaj tagoj, Žilina, Ĉeĥoslovakio (L. Hanzel, Hliny 406A, CS-010 01 Žilina)

23-24 67a Kongreso de Japanaj Esperantistoj, Jokohama (Jokohama E-Rondo, Kōnan-ku, Saido 1-8-14, Jokohama, 233)

23-30 Familia tendaro, Thomsdorf, GDR (W. Pfennig, Leibnizstr. 5/67, DDR-2000 Neubrandenburg)

Septembro

01-29 FERIAJ E-kursoj, Smoljan kaj Varna, Bulgario (Internacia E-Kursejo, pk. 791, BG-1090 Sofia)

02-15 16a Feriado "Ora Pola Aŭtuno", Miedzygórze, Pollando (PEA, pk. 16, PL 50-952 Wrocław)

05-07 Junulara renkontiĝo, Enköping, Svedio (SEJU, Box 4009, S-122 04 Enskede)

05-08 Aŭstria renkontiĝo: "La urbo Steyr — miljara", Steyr Aŭstrio (E-klubo, Schlüsselhofgasse 25, A-4400 Steyr)

06-13 51a Itala E-Kongreso, Manfredonia, Italio (FEI, Via Villoresi 38, I-20143 Milano)

07 Dan-sveda tago, Hillerød, Danlando (B. Kühlmann, Løvetandsvej 31, DK-2700 Brønshøj)

08-13 Simpozio pri lingvokibernetiko en la kadro de la 9a Internacia Kongreso pri Kibernetiko, Namur, Belgio (Eŭropa Klubo, Kleinenberger Weg 16 B, D-4790 Paderborn, FRG)

12-15 4a Kultura Festivalo, Opava, Ĉeĥoslovakio (Org. Kom. ZK Ostroj, Esperanto, Na rybníčku 41, CS-746 01 Opava 1)

14 4a Internacia pilgrimtago, Banneux, Belgio (P.L. Bourdon, 7, av. Salomon, F-59800 Lille, Francio)

15-27 Internaciaj Ferioj, Berlin, GDR (Kulturligo de GDR, Breite Str. 35-36, DDR-102 Berlin)

18-30 Internacia Seminario, Velingrad, Bulgario (M. Ćolev, Br. Krastini 14, BG-4600 Velingrad)

21-28 Semajno ĉe Mediteranea Maro, Sète, Francio (Esperanto, 5 rue Dr. Roux, F-34000 Montpellier)

26-28 Vigla Kurso, As Vig, Danlando (T. Bormann, Schärstr. 26, D-2050 Hamburg 80, FRG)

26-28 16a Kultura Semajnfino, Blieskastel, FRG (SEL, Schulstrasse 30, D-6601 Scheidt)

27-28 Aŭtuna E-Renkontiĝo, Neu-Ulm FRG (Bavara E-Ligo, Seitzstr. 14, D-8900 Augsburg)

27-28 22a Kataluna Renkontiĝo kun Internaciaj Floraj Ludoj, Vilanova i la Geltró, Hispanio (HEF, Freneria 1, Barcelona)

Oktobro

01-14 Konferenco pri E-turismo, Smoljan, Bulgario (Internacia E-Kursejo, pk. 791, BG-1090 Sofia)

01-29 FERIAJ E-kursoj, Varna, Bulgario (Internacia E-Kursejo, pk. 791, BG-1090 Sofia)

03-05 Aŭtuna Semajnfino, Dunblane, Britio (J. Coogans, 9 Cairns Rd., Bishopton, Skotlando PA7 5EH)

08-13 9a Internacia Infana Renkontiĝo kaj 13a Pupteatra Internacia Festivalo, Zagreb, Jugoslavio (IKS, Amruševa 5, YU-41000 Zagreb)

10-12 Aŭtuna Kunloĝado, Tokio, Japanio (E-Domo, Tōkyōto, Sibuya-ku, Yoyogi-san-tyōme 46-17, Sone-biru-502-gō, 154)

11-12 Renkontiĝo de gejunuloj, Bordeaux, Francio (M. Baurer, 17 rue Utrillo, F-33149 Villenave d'Ornon)

15-21 Studkonferenco pri Unuiĝintaj Nacioj, New York — Washington, Usono (UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando)

Ĉi tiun rubrikon redaktas: IAN JACKSON, 6A Eastcombe Road, Weston-super-Mare, Britio BS23 2TQ

LA 37a INTERNACIA
JUNULARA KONGRESO de TEJO:

Kial iri al Meksikio?

JAM EN JUNIO ĉi tiu rubriko enhavis informon, ke la 37a Internacia Junulara Kongreso de TEJO venontjare okazos en Meksikio. La ĉefartikolo de ĉi tiu revu-numero anticipe klopodas kontraŭargumenti la pensojn, ke la 37a IJK okazos "malproksime". Jes ja, ĝi estos malproksima al la dorlotita parto de la movada junularo, tiu en Eŭropo, kie okazis 35 el la ĝisnunaj 36 Internaciaj Junularaj Kongresoj. Aliflanke, la Kongreso en Meksikio estos tute proksima al kelkdeko da meksikaj entuziasmoj kaj al same tia nombro da junaj usonanoj. Ĝi estos multe pli facile atingebla por la gejunuloj el Kolombio kaj Venezuelo, el Kanado kaj Ekvadoro, verŝajne eĉ por tiuj el Brazilo, kvankam oni en Eŭropo malofte konscias, ke flugo el Rio al Meksiko daŭras preskaŭ same longe kiel flugo el Frankfurto al Rio. La demando do ne estas, kial iri al Meksikio? Ni devus respondi la demandon, kial oni ĝis nun ne kuraĝis iri tien.

Esperanta Meksika Junularo, landa sekcio de TEJO, estas kurioza organizaĵo. Ĝiaj ĉefaj aktivuloj ne nur vivas en la multmiliono ĉefurbo Meksiko, sed ili ĉiuj iel ligiĝas al unu familio tiea. Se vi iam dum la lastaj jaroj renkontis meksikan junan homon en junulara kunveno eŭropa, devis temi pri persono kun la familia nomo Nájera. Ne miru, ĉar ili estas entute ses fratoj kaj sep fratoj, plus iom da boparencoj kaj nepoj, plus la gepatroj de tiu impona dektriopo. Al la familio aldoniĝas ankaŭ iom da najbaroj kaj amikoj, konsiderinda parto de la koncerna kvartalo ĉefurba. Pluraj membroj de tiu grupo jam havas internacian movadan sperton kaj tre bone regas la lingvon. Iom forgesitaj tie de la cetero de la Movado, ili organizas siajn proprajn renkontiĝojn kaj seminariojn, presigas eĉ siajn proprajn librojn, havas imponan informan ekspozicion pri Esperanto, luas modernan oficejon kaj ne ĉesas instrui la lingvon al novaj junaj interesitoj.

Laŭ la nuna stato de la aferoj, la organizantojn de la 37a IJK gvidos Margarita Nájera, antaŭa estraranino de TEJO. Sekretarios unu el ŝiaj fratoj, kasistos studentino, kiu ne membras en la familio, kaj pli-malpli ĉiu el la gefratoj kaj amikoj pretas kunhelpi. Tian pretecon esprimis ankaŭ Meksikia Esperanto-Federacio, landa asocio de UEA. Se montriĝos necese, helpon promesas kanadaj kaj usonaj gejunuloj, ankaŭ tiuj el Venezuelo.

Pri Oaxtepec (prononcu: Oastepek) iom da informoj troviĝis en la junia revunumero kaj ni certe ankoraŭ

revenos al ĝi en ĉi tiu rubriko. Specifan trajton al la 37a IJK promesas ankaŭ la fakto, ke Oaxtepec estas feriejo, kiu samtempe provas gastigi proksimume du mil homojn. Tio signifas, ke la TEJO-kongreso venontjare ne okazos izolate en kongresejo, kiun ĝi plene konsumos. Male, estos tie centoj kaj centoj da ekstermovaduloj, kaj eĉ se ili volus tion, ne eblos preteratenti la kongreson kaj ĝiajn manifestaciojn. Tio estas ideala kampo por sukcesa informado pri la Internacia Lingvo.

Simile al la demandoj, kiuj stariĝas ĉirkaŭ la 66a Universala Kongreso venontjare en Brazilo, oni povus pensi pri la plej konvenaj kaj plej malmultekostaj manieroj atingi la 37an IJK. Tamen, la demando estas pli facila, ĉar el Eŭropo eblas malmultekoste flugi al Usono, kaj de tie oni povas eĉ aŭtobuse iri al Meksikio. Aŭdiĝas ankaŭ flustroj, ke ekzistas tolereblaj ĉarto-flugoj el Eŭropo al Meksikio. Ĉio ĉi tamen postulas ankoraŭ detalan esploron al kiu sian atenton dediĉos kaj TEJO kaj UEA dum la venontaj monatoj. Unu afero ja estas klara tiurilate jam nun: eŭropanoj en 1981 ne povos atingi la Kongreson petveture kaj necesas, ke ili komencu ŝpari kaj avari, se ili volas esti en la TEJO-kongreso de Oaxtepec. Eble nur tiuj, kiuj foje estis en Meksikio konscias, kiom valoras tiu ŝparo. Oni renkontiĝos tie kun tute nova mondo, kun alispecaj vivkonceptoj, kun praaĵ civilizoj kaj kun la tuta ekzotika riĉo de la eterne belvetera subtropika pejzaĝo.

El poŝtosako


EN OKTOBRO 1979, TEJO skribis al ĉiuj konataj junaj esperantistoj en Aŭstrio kaj al ĉiuj najbaraj landaj sekcioj, kun la celo revigligi la agadon de Aŭstria Esperanto-Junularo (AEJ). Rezultis (komence de 1980) elekto de nova estraro de AEJ, kaj aŭstroj komencis aperi en internaciaj junularaj renkontiĝoj. Nun venas informo, ke unuafoje en almenaŭ ses jaroj okazos junulara renkontiĝo en Aŭstrio mem. Ĝi estos inter la 26a de septembro kaj la 1-a de oktobro 1980 en Linz. Kunorganizanto estas ankaŭ Germana Esperanto-Junularo. Amasa partopreno de eksterlandanoj helpus al definitiva restarigo kaj reaktivo de AEJ. Pri pliaj informoj skribu al GEJ aŭ al AEJ (Panoramagasse 3, A-8010 Graz, Aŭstrio).

POLA STUDENTA Esperanto-Komitato (PSEK) organizas studentan E-renkontiĝon inter la 18a kaj 25a de aŭgusto. Interesitoj iri al Pollando en la kadro de TEJO-delegacio, tuj anonciĝu.

EN GEEL (Belgio) de la 31a de oktobro ĝis la 2a de novembro Flandra Esperantista Junulara Asocio (Arsemaalstr. 5, B-2000 Antwerpen) planas junularan renkontiĝon.

HUNGARIO invitas al Studenta Aŭtuna Forumo en Debrecen, de la 7a ĝis la 9a de novembro. Skribu al: SRES, P.f. 193, H-1368 Budapest, Hungario.

ŜIHEJ MIJAKE (1901-1980), membro de la Akademio de Esperanto kaj Honora Membro de UEA, mortis en Tokio la 29an de majo. Esperantistiĝinte en ĉ. 1920, li estis inter 1931 kaj 1971 unu el la plej aktivaj gvidantoj de la japana Esperanto-movado. Eble lia plej grava iniciato estis la lanĉo de kunloĝaj Esperanto-kursoj en 1962. Tiu maniero organizi kursojn poste sufiĉe enradikiĝis. Mijake kompilis *Vortaro de Esperanto* (1965), verkis *Elementa legolibro de Esperanto* (1971) kaj tradukis literaturaĵojn el la japana, franca kaj angla (*La rakonto de Ŝuzenĝi*, *Leteroj el la muelejo*, *Literatura legolibro: tragedioj de Shakespeare*).



JOHN SHARP DINWOODIE (1904-1980), kiu mortis la 9an de junio, estis la plej aĝa el la kunfondintoj de la skota skolo de la Esperanta poezio, kiuj debutis en *Kvaropo* (1952, 2a eld. 1977). Lia parto en *Kvaropo* – titolita *Kastelo el revoj* – restis lia sola originala poemaro. Li iam kontribuis al *Literatura mondo*, kaj iuj liaj poemoj aperis kaj aperos en *Esperanto en Skotlando*. Dinwoodie brile tradukis el la brita poezio; liaj tradukoj aperis i.a. en *Angla antologio* (1957) kaj *Skota antologio* (1978), pri kiu li faris ankaŭ la unuajn redaktolaborojn. En *Esperanta antologio* Dinwoodie estas reprezentita per ses poemoj.

D-RO LUDOVIKO GYÖRNY NAGY (1892-1980) mortis la 19an de februaro. Li estis delegito de UEA en Miskolc, Hungario. Li havis grandajn meritojn pri la atingoj sur la tereno de la lerneja instruado de Esperanto kaj li estis ricevonta pro tio distingon de la hungara ministerio pri instruado.

TERUHIKO ISIGURO (1906-1980), kiu mortis en Tokio la 11an de majo, estis aktiva en diversaj fakoj de la Movado kaj ekster ĝi. Kiel komitatano de UEA ĝis 1977, LKK-ano por la tokia UK en 1965 kaj multjara direktoro de Japana Esperanto-Instituto, li kunkonstruis la organizitan Movadon en sia lando. Kiel tradukanto el la japana, d-ro Isiguro kunlaboris kun Masao Miyamoto pri *El japana literaturo* (1965) kaj pri *El la vivo de Syunkin* (1968). Li ankaŭ kontribuis per la traduko de *La belan pacon* (1959) al la movado kontraŭ nukleaj armiloj.

DANČIKA NIKOLIĆ (1912-1980) mortis en Beograd, Jugoslavio, la 30an de majo. Li estis fakdelegito de UEA pri soci-ekonomia planado. Esperantistiĝinte en 1931, Nikolić estis aktiva en la loka kaj landa movado. Li kunfondis plurajn lokajn Esperanto-societojn, aktivis en SAT, estis vicprezidanto de Serbia Esperanto-Ligo kaj dum multaj jaroj komitatano de Jugoslavia Esperanto-Ligo.

RENÉ BALLEUX (1903-1980) mortis la 2an de marto en Deurne (Bel-

gio). Balleux, lerninte Esperanton en 1950, aktivis en diversaj organizaĵoj de la Movado en Belgio. Li estis ankaŭ kunfondinto de antverpena Esperanto-grupo kaj de Flandra Esperanto-Ligo.

VASILE ĜORGIESKI (1906-1980), kiu mortis en Prilep (Jugoslavio) la 4an de februaro, postlasis al sia loka societo riĉan brajle presitan libraron. Li aktive partoprenis en la laboro de la societo jam ekde ĝia fondiĝo en 1928 kaj laboris ankaŭ en la blinda Esperanto-movado.

ERNST WILHELM ANJOU mortis en Göteborg, Svedio, la 26an de februaro 1980. Li estis fakdelegito de UEA, aranĝis karavanojn al kongresoj kaj dum kvardek jaroj aktive kunhelpadis en klubaj aranĝoj; li faris prelegojn kaj gvidis Esperanto-kursojn.

SOKRATIS KUSURAKIS, admiralo, fakdelegito en Ateno pri matematiko kaj pri maristaj aferoj, mortis la 16an de decembro 1979. Li estis prezidanto de la Supera Esperanto-Lernejo de Helena Esperanto-Asocio, kies vicprezidanto Kusurakis ankaŭ estis. En 1976 li estis vicprezidanto de la LKK de la 61a UK en Ateno.

ZENMARO TOKI (1885-1980), fama poeto en sia lingvo kaj membro de la Japana Arta Akademio, mortis en Meguro, Japanio, la 15an de aprilo. Inter liaj verkoj troviĝas japanlingva biografio de Zamenhof (1929). Toki ankaŭ aktivis en la movado por latinliterigi la japanan lingvon. Li estis eksmembro de la japana nacia Unesko-Komisiono.



Kanado

- Kanada Esperanto-Asocio nun funkciigas du informfakojn, france kaj angle. La fakojn estras respektive Trefflé Mercier kaj W.G. du Temple. La centra oficejo de KEA ofsetas kaj sendas la bultenojn al centoj da mezlernejoj kaj altlernejoj kaj al plurdeko da gazetoj.
- Sukcese finiĝis la unua universitata Esperanto-kurso en Kanado – en la universitato de Sherbrooke. Ĝi daŭris de septembro 1979 ĝis ap-

rilo 1980. El la 17 komencintoj, meze 30-jaraĝaj, 11 finlernis. La universitato decidis aranĝi la kurson ankaŭ venontjare.

Ĉinio

- Ĉina Esperanto-Ligo, Radio Pekino, *El popola Ĉinio* kaj Guozi Shudian (Fremdlingva Eldonejo) kune aranĝis en Beijing Esperantan ekspozicion en la ĉefa halo Yuexin sur la jada insuleto en la lago Bei-Hai, kie troviĝas malnova imperies-

tra ĝardeno. La ekspozicion, kiu daŭris de la 22a de majo ĝis la 2a de junio, vizitis multnombra publiko. La organizantoj volis tiel celebri la 30an datrevenon de *El popola Ĉinio* kaj diskonigi Esperanton. En majo ĉi-jare Ĉina Esperanto-Ligo eldonis 66-paĝan varbbroŝuron *Kio estas Esperanto?*

Svedio

- La Esperanto-asocio de Uppsala, fondita en 1891, estis la dua Esperanta grupo en la mondo (post la unua en Nürnberg). Ĝia plej malnova membro, Karl Söderberg, nun redaktas historion de ĝi. Sed mankas al la klubo ĝiaj propraj jarkolektoj 1909-1928 kaj pluraj protokolibroj. Multjaraj movadanoj, esperantologoj k.s. povas helpi per sendo de informoj kaj materialo al K. Söderberg, Luthag-sesplanaden 15 A, S-752 25 Uppsala, Svedio.

Nederlando

- Esperanto-Centro Maastricht organizis Trilandan Renkontigon por esperantistoj el Nederlando, Belgio kaj FR Germanio la 3an kaj 4an de majo. Sesdek personoj partoprenis. A. Brennan prelegis tie pri la funkcioj de virinoj en la hodiaŭa socio.
- La politika partio EPV (Evangelia Progresema Popolpartio) enprogramigis rekomendon pri uzo de Esperanto kiel "komuna diskutlingvo" internacia. Estas interese, ke ankaŭ alia malgranda politika unuiĝo en Nederlando – Calvinista Politika Partio (GPV) – favore rilatas al Esperanto.

Usono

- Estas fondita en Florido, Usono, Sud-Orienta Esperanto-Centro (Box 1042, Indian Rocks Beach, Florida 33535, Usono). Ĝi ne nur volas kunordigi la regionan movadon sed ankaŭ aspiras al eldonado. Oni projektas anglalingvan eldonon i.a. de *Esperanto sen antaŭjuĝoj* de W. Francini.

Hispanio

- La radiostaciario SER, kiu kunligas staciojn el diversaj partoj de Hispanio, disaŭdigis unuhoran programon pri Esperanto la 8an de majo. Parolis ĉefe J. Carlos Ruiz Sierra, prezidanto de la LKK de la 40a Hispana Kongreso de Esperanto, kaj A. Casquero de la Cruz, prezidanto de Madrida Esperanto-Liceo. Ili liveris faktojn pri la gramatiko, vor-

taro, literaturo kaj disvastiĝo de la lingvo.

- Lige kun la konstanta Esperanto-kurso, kiun s-ro A. Alonso Núñez gvidas en la filologia fakultato de la universitato de Santiago de Compostela, okazis tie antaŭ nelonge ekspozicio kaj prelegoj pri esperantologio kaj interlingvistiko. Inter alie prof. J. Régulo Pérez prelegis pri "Lingvistiko de Esperanto".

Aŭstralio

- Dum majo, en Aŭstralia Nacia Universitato en la ĉefurbo Kanbero, okazis internacia konferenco pri la Korano por festi la 1400-jariĝon de la islama erao. Lige kun tiu konferenco, en la universitata biblioteko estis ekspoziciitaj *La Nobla Korano* kaj *Je la flanko de la profeto* kune kun ok alilingvaj tradukoj de la Korano.

Fake

Kibernetiko

- Kiel anoncote en nia februara numero, inter la 8a kaj la 13a de septembro okazos en Namur, Belgio, la 9a Internacia Kongreso pri Kibernetiko, uzante Esperanton kiel la trian oficialan lingvon kune kun la angla kaj franca. Dek ok fakuloj parolos tie en Esperanto. Unu el ili, d-ro H. Frank (Kleinenberger Weg 16 B, D-4790 Paderborn, FR Germanio), kampanjas por ke Internacia Kibernetika Asocio akceptu Esperanton kiel konstantan oficialan laborlingvon.

Literaturo

- En la sidejo de Goethe-Institut en Milano (Italio), la 1-an de junio okazis la premiado de la literatura konkurso "Eŭropo". En la esperantlingva branĉo, la unuan premion ricevis Adalberto Hules (Hungario), la duan J.H. Rosbach (Norvegio), kaj la trian Nicolino Rossi (Italio). La esperantistoj C. Mallia kaj J.H. Rosbach gajnis la unuajn premiojn en la angla (Mallia) kaj germana (Rosbach) sekcioj.
- *World literature today*, kvaronjara beletra revuo de la Universitato de Oklahomo, aperigis en sia vintra numero de 1980 recenzojn pri *Japana variacio* kaj *La turoj de l' ĉefurbo*. Recenzis, anglalingve, prof. Humphrey Tonkin.

Sociaj sciencoj

- D-ro Francesco Pignatelli (V. Colotti 5 int. 10, I-35100 Padova, Italio) fondis internacian asocion de esperantistoj kiuj okupiĝas pri la sociaj sciencoj (psikologio, sociologio, antropologio, sociala helpado ktp.). Multaj fakuloj jam aliĝis al ĉi tiu organizaĵo, kiu celas antaŭenigi interŝanĝon de scioj kaj opinioj, eldonadon, terminologian laboron, transnaciajn esplorojn (ĉefe pri sociaj kaj psikaj aspektoj de la Movado) kaj disvastigon de Esperanto inter



- FR Germanio: La 22an de junio, la Esperanto-grupo Paffenhofen ĉe Munkeno festis sian dekjaran ekziston. Okazis strata procesio kaj ekspozicio. En ĉeesto de plurdeko da gastoj oni inaŭguris Zamenhof-straton. La stratnomŝildon malkovris japana gastino Ikuko Sona. Similaj aranĝoj estas oftaj en Munkeno, kies klubo havas 120 membrojn, kompare kun nur 60 antaŭ kvar jaroj.

sociosciencistoj. Petante informon ĉe d-ro Pignatelli oni aldonu respond-kuponon.

Eksteraj rilatoj

- Lige al la 70-jariĝo de Unio de Internaciaj Asocioj, okazis en Bruselo Monda Forumo de Internaciaj Asocioj inter la 23a kaj la 27a de junio. S-ro E. Symoens, prezidanto de Flandra Esperanto-Ligo, reprezentis UEA kaj ILEI en tiu forumo. Liaj klarigoj, i.a. pri la funkciado de esperantistaj kunvenoj sen interpretistoj, instigis plurajn inform-petojn flanke de ĉeestantoj, kiuj reprezentis tie aliajn internaciajn organizaĵojn.

Tradukado

- Artikolon de d-ro W.A. Verloren van Themaat pri la nederlandaj literaturaĵoj en Esperanta traduko aperigis la grava kultura revuo *Ons erfdeel* (nia heredaĵo) en sia numero por majo/junio ĉi-jare. La artikolo havas konsiderindan amplekson.

Sporto

- En Polski Trambes, Bulgario, okazis tuturba ekspozicio pri la ĉi-jaraj olimpikoj. La loka Esperanto-societo impone kontribuis, havigante pli ol 260 erojn el 23 landoj. Poste la ekspozicio translokiĝis al Veliko Târnovo.

Mondanismo

- Inter la 24a de julio kaj la 6a de aŭgusto, la 18a Monda Kongreso de Mondfederalistoj kaj la 3a Monda Asembleo de Planedaj Civitanoj okazos ĉefe en Tokio kaj parte en aliaj japanaj urboj. En ĝia kadro aktivuloj de Japana Esperanto-Instituto organizas, la 27an de julio, Seminarion pri Lingvaj Problemoj en Nova Internacia Ordo. Tiu aranĝo uzos oficiale Esperanton kun interpreto por la japana kaj la angla.

Vegetarismo

- Dum lastatempa regiona konferenco (en Luksemburgo) de Internacia Vegetara Unio, Esperanton parolis pluraj partoprenantoj, kiuj volas, ke ĝi estu oficiala lingvo dum la mondkongreso de IVU en 1982. En la julifina kongreso, en Pollando, de Tutmonda Esperantista Vegetara Asocio, oni ekorganizos kampanjon por tiu celo. Interesitoj kontaktu

TEVA ĉe la eldonanto de *Esperantista vegetarano*, Christopher Fettes (St Columba's College, Dublin 16, Irlando), kiu estas ankaŭ la regiona sekretario por Eŭropo de Internacia Vegetara Unio.



Rotario

- En Ĉikago, inter la 1-a kaj 4a de junio, 20 000 rotarianoj el 154 landoj partoprenis mondkongreson. Rotaria Asocio de Esperantistoj, kiu havas centon da membroj, organizis informan standon pri Esperanto. Tie deĵoris i.a. G. Leon-Smith (sur la foto), prezidanto de tiu faka Esperanto-organizaĵo.

Persone

Harry

- Ralph Harry, membro de la Honora Patrona Komitato de UEA, antaŭa ambasadoro de Aŭstralio ĉe Unuiĝintaj Nacioj kaj en pluraj ŝtatoj, komence de julio ricevis la altrangan registaran distingon "Companion of the Order of Australia". Ekde la 1-a de julio ĉi-jare Harry estas la prezidanto de Aŭstralia Esperanto-Asocio. Li transprenis tiun funkcion de prof. R.G. Robertson, kiu gvidis tiun aliĝintan landan asocion de UEA de post 1972.

Pool

- Unu el la estraranoj de Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo, d-ro Jonathan Pool, dum junio kaj julio ĉi-jare gastas en Paderborn (FR Germanio). D-ro Pool, kiu lektias pri politikscienco en la Universitato de Vaŝingtonio (Usono), en Paderborn estas gast-esploristo ĉe la tiea Instituto pri Kibernetika Pedagogio. Liaj esploroj inkluzivas ankaŭ temojn, kiuj rilatas al Esperanto: aŭtomata dokumentado pere de la Internacia Lingvo kaj la utiligo de Esperanto kiel enkonduko al la lernado de aliaj lingvoj.

Oficiala Informilo

N-ro 537

SOCIETO ZAMENHOF 1980

BELG: 203 Grégoire Maertens.
FINNL: 204 anonima. FRANC: 205 François Lo Jacomo; 206 Jack-André Rousseau. US: 207 Yul Balbin; 208 Gizelle Giguere.

DONACOJ 1980 (Gld.) ĝis la 30a de junio

ASOCIA KAPITALO: Britio: heredaĵo H.P. Saunders 446,25. Israelo: heredaĵo Engelŝer 155,00. Nederlando: H. Veenstra 500,00. Sumo ĉi-jara 1 211,25.

FONDAĴO AZIO-AFRIKO: Nederlando: anonima 900,00. Sumo ĉi-jara 3 777,19.

FONDAĴO CANUTO: Nederlando:

anonima 1 000,00. Sumo ĉi-jara 1 823,70.

FONDAĴO OFICEJA ILARO: Argentino: M. Valentinuzzi 32,95. Britio: Nassif Isaac 50,00. FR Germanio: W. Heinrich 1 097,03. Sumo ĉi-jara 7 057,69.

FONDAĴO TEJO: Aŭstrio: M. Gritsch 74,90, G. Nitsch 164,90. Sumo ĉi-jara 355,86.

ĜENERALA KASO: Finnlando: N. Kavenius 159,60. Japanio: Kazuo Osaki 11,63. Nederlando: R.H. Bos-song 11,13, H. Weulen Kranenberg 100,00. Sumo ĉi-jara 2 010,25.

NOV-JORKA OFICEJO: Patronoj (minimуме \$100): Kanado: Kenneth F. Price. Usono: Thomas H. Goodman, Simon Mudrey, Eugene

H. Thompson, Jr. Amikoj (min. \$10): Aŭstralio: Ralph Harry (\$50). Britio: J. Brownlee (111,37 gld.). Kanado: David Winters. Svedio: Sten Svenonius. Usono: Gizella Giguere, s-ino E. Lewin (\$50), Ian Lubow, Minerva Massen (42 gld.), Franklin Montenegro (\$50), Spokane Esperanto Club (\$50), San Francisco Esperanto Regional Organization (\$25), Lucille H. Thompson (\$10,50), Marie Zimmermann. Sumo ĝisnuna: 13 447,00 gld.

PATRONOJ DE TEJO: 32 J.M. v.d. Hengel, Nederlando. 33 R. Corsetti, Italio.

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA

ekzameno



Redaktas: B. Golden,
Csikász u. 11.III.3
H-8200 Veszprém, Hung.

RESPONDO 35

(pri la demando vidu nian numeron de aprilo 1980)

a. Jeanne Ranfaing Zabilon d'Her (1868-1924), kies pseŭdonimo estis Evidino, prezentis paroladojn kaj verkis artikolojn pri Esperanto, ankaŭ instruis kursojn kaj organizis internacian loterion por la tutmonda blindularo. Antaŭ la unua mondmilito ŝi kontribuis al *L'Espérantiste* per noveletoj kaj poemoj, kaj tradukis en Esperanton la prireligian verkon de J. Serre, *La hipotezoj pri Lourdes* (1912).

b. Harald J.E. Thilander (1877-1958) verkis multnombrajn artikolojn pri Esperanto por francaj, anglaj kaj germanaj porblindulaj gazetoj. Li presis kaj redaktis ankaŭ Esperanto-periodaĵojn. Dufoje li "edzperantistiĝis". Lia unua edzino, svedino Karin Höjer (1866-1927), estis orgenistino kaj muzikinstruistino. Post ŝia morto, Thilander edzinigis Elisabet Varna el Finnlando, kiu verkis originale en Esperanto kaj ankaŭ tradukis beletraĵojn en la zamenhofan lingvon.

c. Théophile Cart (1855-1931), kiu esperantistiĝis en 1901, kunfon-

dis kaj administris la gravan eldonejon Presa Esperantista Societo kaj estis prezidanto de la Akademio de Esperanto. En 1904 li organizis Esperanto-kurson en la blindulejo de Lausanne, Svislando. Kunlabore kun siaj plej bonaj lernintoj, Helena Gal kaj Roza Vogt, kaj kun Harald Thilander, Cart adaptis la brajlan alfabeton al Esperanto. Poste li presigis Esperanto-lernolibrojn en pluraj lingvoj.

ĉ. *Esperanta ligilo* estis fondita de Théophile Cart en Parizo en 1904. Ĝia enhavo konsistis el blindulaferaĵoj kaj priesperantaj artikoloj kaj ankaŭ beletraĵoj. Ekde 1912 ĝi estis redaktita kaj presita de Harald Thilander en Stokholmo. *Esperanta ligilo* ankoraŭ ekzistas; nuntempe ĝi estas la organo de la Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj (LIBE).

d. Émile Javal (1839-1907) inventis utilajn oftalmologiajn instrumentojn por okulmezuroj kaj publikigis verkojn pri la fiziologio de la skribado. Lia franclingva libro *Entre Aveugles*, verkita de post la perdo de lia vidpovo, estis tradukita Esperanten fare de lia bofilino kun la titolo *Inter blinduloj: Konsiloj por uzado de ĵus blindiĝintoj* (1907).

e. *Jolanto*, la filino de l' reĝo René, kies originala titolo estis *Kong Renés Datter*, estis verkita de Henrik Hertz (1798-1870), dana poeto kaj teatraĵverkisto, kaj eldonita en Kopenhago en 1845. La tradukinto estis Hjalmar Johannes Runeberg, finland-sveda literaturisto, kiu estis esperantistigita fare de Théophile Cart en 1901. Poste li instruis kursojn por blinduloj.

f. La unua blindula kongreso okazis en Prago en 1921. Ĝi estis direk-

tita de Théophile Cart post prepara laboro de la blinda muzikisto K.E. Macan kaj la vidanta blindamiko prof. Stanislav Strejskal. Dek kvar jarojn pli frue grupo de blinduloj partoprenis en la 3a Universala Kongreso en Kembriĝo, Anglio. Cart zorgis ankaŭ pri tiu grupo, kaj d-ro Zamenhof havis okazon renkontiĝi kun ili.

g. *Inferio*, fantaziromano verkita de Hindrik J. Bulthuis (1865-1945), estis eldonita en 1938. Unu el la tri malkovrintoj de la utopia insulo de la blinduloj estas kuracisto, kiu per simpla operacio redonas la vidpovon al tri insulanoj, por ke ili povu viziti la urbon Saidumo en Inferio kaj observi la civilizon. Tiu ĉi, laŭ la aŭtoro, estas la antipodo de la harmonia socio de la blinduloj.

ĝ. La Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj (LIBE) estis fondita en 1950 kun la celo unuigi blindulojn en la tuta mondo por la plibonigo de ilia sorto kaj ĉiurimede disvastiĝi Esperanton inter la blinduloj. Ĉiujare LIBE laŭpove aranĝas Internacian Kongreson, ĝenerale en la kadro de la Universalaj Kongresoj. Ĝia organo estas *Esperanta ligilo*.

h. En 1973 kaj denove en 1977 estis eldonita *Zapaliv ja u serci vogonj* (Ekbruligas mi fajron en kor') de Nadija Gordijenko-Andrianova, UEA-fakdelegito pri ĵurnalismo kaj literaturo en Kiev. La biografio temas pri Vasilij Eroŝenko (1890-1952), kiu naskiĝis en Kiev kaj en 1912 entreprenis sian unuan Esperantan vojaĝon al Britio. Li pasigis plurajn jarojn en Japanio kaj verkis ankaŭ japane. En Pekina Universitato, Ĉinio, li instruis Esperanton kaj lekciojn pri la rusa literaturo.

VESELIN DAMJANOV kantas en esperanto

Gramofondisko, kiu apartenas al la plej belaj kaj plej malmultekostaj en la Esperanta merkato. Por samtempa mendo de 3 ekz. la Libroservo de UEA donas al ĉiuj klientoj 33-procentan rabaton.

VESELIN DAMJANOV KANTAS EN ESPERANTO. Pianakompano de E. Komarov. Sofia: Balkanton, 1978. 30cm.33t/m, duflanka, stereofona. BOA 2180. Dek du kantoj en profesia interpreto de esprimriĉa baritono. Prezo: 18,00 (por Nederlando 21,24) gld., plus sendokostoj 10%.

Anoncetoj

Ekspozicio de infandeseĝnaĵoj. Libera temo. Dor-se skribu nomon kaj aĝon. Ni rekompencos laŭ-dezire. Esperanto-Grupo, Str. Forn 19, Moyá (Barcelona), Hispanio.

Paulina Lazarova, 28-jara bibliografiistino, Han Omurtag 62, BG-1504 Sofia, Bulgario, posedas pli ol 4000 kalendaretojn. Proponas interŝanĝon – peco kontraŭ peco.

Kiel eviti diskriminacion kontraŭ handikapitoj? Bona volo ne sufiĉas sen iom da kompreno. Legu la broŝurojn pri rilatoj kun homoj, move aŭ vide handikapitaj: respektive *Ĉu ne eblus ĉi tiel?* kaj *Ne tiel sed ĉi tiel*. Akireblaj ĉe la libroservoj de la 65a Universala Kongreso kaj UEA.

Al "Rondo Harmonia", japana Esperanta organizaĵo, ni apartenas. Ni deziras korespondi kun tut-mondaj gesamideanoj. Reprezentanto: Suzuki Motocugu ĉe Kirijama 875 cudaka okazama-ŝi 701-11 Japanio.

TARIFO: Ĉiu vorto kostas 0,80 guldenojn (unu internacian respondkuponon). Pri la enhavo de la anoncetoj respondecas nur la anoncantoj mem. Ili bonvolu memori, ke ni ne donas rabaton pro la ripetado de la anoncetoj.

Por fari filmon pri la vivo de Lidja Zamenhof, ni bezonas ĉiujn informojn, kiujn vi eble posedas pri ŝi. Serge Reverdin, Avenue du Temple 13, CH-1012 Lausanne, Svislando.

Studgrupo kun 16–80-jaraj geanoj deziras korespondi kaj interŝanĝi bildkartojn, poŝtmarkojn ktp., tutmonde. Esperanto-Klubo de Iisalmi, Louhenkatu 5, SF-74100 Iisalmi, Finnlando.



Sep japanaj knabinoj (12–15-jaraj) deziras korespondi kun geamikoj de tuta mondo (12–18-jaraj). Skribu al ilia gvidanto: s-ro Taĉibana Takamasa, Nisiageo-daini-danti 1-13-102, Ageo-si, 362 Saitama-ken, Japanio.

Esperanto en radio: Ĉu vi legis la artikolon "Kiel argumenti por pliaj elsendoj?" en la aprila revu-numero? Rigardu al tiu teksto kaj, se la dua cifero de via poŝtkodo, bankkonto aŭ pasporta numero estas 7 aŭ 8, bonvenus, ke vi nun skribu pri Esperanto-elsendoj al kelkaj radio-stacioj. Ek!

Savu nin

per starigo de la
SUPERDEMOKRATA MONDORGANIZO!

♦ Esp/28

SENUTILAS proklami ofte kaj laŭtvoĉe la Homajn Rajtojn, unuflanke, kaj malebligi aliflanke la tujan malsovaĝigon de la politika aktiveco. La dua nuligas praktike la efektivigon de la unua. Precipe: neniu speco de registaro povas praktike observi kaj observigi la rajton je la vivo ĝis la sovaĝeco de la politiko, kiu kaŭzas malobservon de tiu rajto, definitive mal-aperos. Nur kiam la Homaro estos transformita en unikan orkestron, bone funkciantan, la Homaj Rajtoj povos esti ankaŭ konkrete observataj kaj defendataj de politikaj estroj. Ĝis tiam, tiu eblo absolute mankos. Ĝis tiam, eĉ se centoble pli laŭte proklamataj, tiuj distrumpetitaj rajtoj restos nur provizora iluzio, ne pli.


♦ Esp/29

LA TRIUMFO de la homa stulteco kondukis nin sur la randon de la abismo. La sanuloj nun volus savi nin per supera perforto. Tamen, en la valorigo de la saĝo kuŝas la ~~slaso~~ de la elirpordo. Saĝo, siavice, kondukas al **MORALO**, al valorigo de la disciplino, kiu bidas la unuopulan liberecon. Sekve, por savi sin kaj

siajn karulojn de la ĉiutage alproksimiĝanta ekstermo de la Homaro, la politika kliento devas deturni sian rigardon kaj fidon de supera perforto kaj direkti ĝin al supera saĝo, akceptante la disciplinon necesan kaj la limigon de la libero ĝis la bezona grado.


♦ Esp/30

LA BOJKOTADO de la konkreta efektivigo de unu-sola monda registaro estas la krima kaŭzo. Ĝi burĝone entenas ĉiujn postajn fiajn konsekvencojn, kiuj nepre sekvos. Jen kial oni devas supreniri ĝis la homoj, kiuj per sia sinteno starigis la kaŭzon de la epidemioj sociaj, kiuj neeviteble sekvis je la plantita kaŭzo, kaj severe puni ilin. Inter la miliarda amaso de politike ne decidantaj personoj troviĝas nur deko kies decido estis vere efika. Nur al tiu deko la tuta homaro devas danki pro la militaj kaj revoluciaj epidemioj, kiuj periode okazas en la mondo.



MONDHARMONIIGA INSTITUTO
VIA SPORT 18, I-40065 PIANORO, ITALIAO

Ĉu vi
valoras
la
libron?



Du mil homoj jam aĉetis la libron, ĉar. . .
"Ĝis plibonigenda reeldono aŭ apero de
Enciklopedio, ĝi estas la plej bona kaj plej
informriĉa libro iam ajn verkita pri la In-
ternacia Lingvo." M. Duc Goninaz

Verkis Ivo Lapenna (ĉefred.), Ulrich Lins (red.)
kaj Tazio Carlevaro. Eldonis UEA/CED, 1974.
876p. 20,5x14cm. 65 ilustropaĝoj. 40 indekso-
paĝoj. ISBN 92 9017 016 6. Prezo: 84,00 (por
Nederlando 87,36) gld., plus sendokostoj 10%.

ABZ de amo estas havinda popularsciencia verko por ĉiu

Ĉi tiun 274-paĝan enciklopedion de la
seksa vivo verkis danaj psikologoj Inge kaj
Sten Hegeler, kaj tradukis Ib Schleicher
kaj August Weide.

Formato: 25cm. Ilustrita. Bindita per ledoimita
plasto. ISBN 87 87089 09 2.

Prezo: 33,78 (por Nederlando 35,13) gld. plus
10% por la sendokostoj. Por samtempa mendo
de minimume 3 ekz., UEA donas 33-procentan
rabaton.

Mendu ĉe: Libroservo de UEA, Nieuwe Binnen-
weg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

KINO-FILMO EN ESPERANTO

NI KREAS FILMON EN ESPERANTO! LA FILMO MONTROS LA HISTORION DE
ESPERANTO KAJ LA VIVON DE LIDJA ZAMENHOF. FOTOKOPIO DE LA SCENARIO
ESTAS HAVEBLA (FRANCLINGVE), POR LA PREZO DE 10,00 SVISAJ FRANKOJ.
POR FINANCI LA FILMON NI KREIS LA AKCIAN SOCIETON "PAX-FILM S.A.". LA
AKCIOJ KOSTOS 100,00 SVISAJN FRANKOJN. LA FONDKUNVENO OKAZOS LA
21-AN DE MARTO 1981 EN LAŬZANO, SVISLANDO. ĜIS LA FONDKUNVENO S-RO
SERGE REVERDIN RESPONDECOS PRI LA AFEROJ DE LA SOCIETO.

ĈIU ESPERANTISTO POVAS KUNHELPI KREI LA FILMON, PER PARTOPRENO EN
LA FONDKUNVENO, PER AĈETO DE LA AKCIOJ AŬ PER PLENUMO DE ROLO EN
LA FILMO. ĈIU, KIU AĈETOS LA AKCIOJN POR MINIMUME 100,00 SVISAJ FRAN-
KOJ, RICEVOS INVITON AL LA FONDKUNVENO. PRI EVENTUALAJ DEMANDOJ
KAJ ALIĜFORMULAROJ SKRIBU AL: S-RO SERGE REVERDIN, AVENUE DU TEM-
PLE 13, CH-1012 LAUSANNE, SVISLANDO.